

**Bulteno de la Nordfrancia Esperanto-Federacio – Fondita en 1908**



**La Vorto de la Prezidinto**

**DANKON!**

“ Lastan fojon mi verkas la **Vorton de la Prezidanto**. Dum la lasta ĝenerala membrokunveno, kiu tre sukcese okazis la 14an de Aprilo 2013 en Halluin, mi anoncis la deziron ne kandidatiĝi al plia trijara mandato kiel prezidanto. La fakto, ke en 2015 okazos la Universala Kongreso en Lille, vekis en mi la konvinkon, ke estus multe pli oportune, ke iu membro de Lille-Villeneuve-Espéranto estu prezidanto de la Norda Federacio. Rilati kun lokaj politikistoj kaj respondi pri surlokaj organizadoj postulos ne nur sindonemon, sed ankaŭ konstantan proksimecon. Michel DECHY komprenis tiun argumenton kaj konsentis transpreni la torĉon. Mi dankas lin kaj mi certas, ke sub lia gvidado niaj komitato kaj estraro daŭre kaj efike kunlaboros por prosperigi nian federacion.

Kun granda plezuro, dum tri jaroj, mi plenumis la taskon de Prezidanto. La amikecaj rilatoj, la fruktodonaj kunlaboroj, permesis antaŭenigi nian agadon, kiu daŭre progresas:

– Kune ni sukcesis instigi la izolulojn kaj la lokan klubon de Pikardio aliĝi al la Norda Federacio.

– Kune ni sukcesis daŭre oferti altkvalitan kursaron kaj kulturplanan

**Sekvo p. 2 • • •**

**Vivo de la Nordfrancia Federacio**

**Kongreso en Halluin (nur la verega vero)**

“ **L**a ĉi-jara kongreso de la Norda Federacio ne povos okazi en Halluin!” diris mi al mia edzino la 12-an de Marto 2013, kiam, tute hazarde eniginte la antaŭan parton de mia kapo en la salonon, mi rigardis al la televidilo, kaj tuj ekvidis malsupre de la ekran-o la jenan tekston: “Halluin: la salle du Manège...”.

Sekvis mallonga informo koncerne la abundan tiutagan neĝon, kiu pro la forta vento ne nur estigis blankajn netravetureblajn dunteojn antaŭ la pordo de mia garaĝo, sed ankaŭ enfiltriĝis sub la tegmenton de nia onta kongresejo, antaŭ ol perfide fandiĝi super ties plafono! Tial la teknikaj responsuloj de Halluin tre timis difektiĝon de la sekurigaj sistemoj, kaj anoncis longtempan riparadon. La damaĝoj feliĉe ne estis tro gravaj, kaj danke al la urba teknika skipo, la “salle du Manège” remalfirmiĝis post dek tri tagoj. Uf!

La ĉi-jara kongreso de la Norda Federacio do ja okazis en **Halluin** la 14-an de Aprilo.

Jam je la 9-a horo kaj 11 minutoj

mi haltigis mian aŭton sur malplena parkejo tuj apud la kongresejo. Mi paŝis al la enirpordo kiel eble plej malrapide, por lasi iom da tempo al la organizantoj: se oni alvenas tro frue, oni devas ilin helpi por instali seĝojn kaj tablojn, starigi kakemonojn, ktp.

Nu, miaj paŝoj ŝajne ne estis sufiĉe malrapidaj, ĉar Michel DECHY tuj kaj senhezite metis en miajn manojn kakemonon kaj difektitajn stangetojn, kaj komisiis min enigi la rompitaĵojn de la stangetoj en trutojn videble tro malgrandajn. Dum per dratpecetoj mi sensukcese provis plenumi la atenditan miraklon, Michel bezonis apenaŭ du sekundojn por ridindigi min, fiksante per glubendo la supran parton de la kakemona al iu vertikala tabulo. Jen tutcerte kial mi neniam kapablos esti federacia prezidanto!

Almenaŭ, mi povis nun babili kun kelkaj geamikoj. Bedaŭrinde, sciante ke oni devigis min trapasi en Junio la parolan C1-ekzamenon, ili perfide starigis perpleksigajn demandojn: “Ĉu vi kapablos traduki ‘un terril’ kaj ‘un chevalement de mine’?” afable demandis al mi Marianne DUNLOP...

programon dum la ĉiujara Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage.

- Kune ni sukcesis aperigi regule nian belaspektan kaj bonkvalitan bultenon "Norda Gazeto".
- Kune ni sukcesis renovigi la tombon de Émile GROSJEAN-MAUPIN en HERNICOURT. Ni ŝuldas apartan dankon al nia forpasinta sindonema Nicole BÉCANT kaj al la ĵurnalisto Marcel BAYART, kiu per bona artikolo en loka gazeto atentigis nin pri la stato de la tombo. Lia libro "Saint-Pol et sa région" (eldonejo Alan Sutton) provizis nin per multaj interesaj informoj pri la lasta loĝejo de la fama vortaristo.
- Kune ni sukcesis organizi la ekzamenojn de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro dum la tutmondaj sesioj, kaj ankaŭ la ĉiujarajn ekzamenojn de la Franca Esperanto-Instituto.
- Kune ni sukcesis organizi ĉiujare tuttagajn federaciajn kongresojn. Dankon al la lokaj kluboj de Amieno kaj Araso, kiuj bone organizis ilin la tri antaŭajn jarojn, kaj apartan dankon kaj gratulon al la klubo de Lille-Villeneuve, kiu mirinde organizis la lastan en Halluin. La publiko ĝuis la talenton de nova artisto en nia movado: Gijom ARMIDE.

Tiu kontentiga bilanco instigas nin daŭrigi la farendaĵojn: persone, mi restas komitatano, kaj mi plu zorgos kun entuziasmo pri la organizado de nia Eŭropa Rendevuo en Stella-Plage. La ĉi-jara estos jubilea. Vi denove ĝuos la talenton de Gijom ARMIDE en tute nova prelego-koncerto. Atente legu la kunmetitan allogan programon, kaj rapide resendu vian aliĝilon al nia federacia kasisto Xavier VILAIN. Kompreneble, mi plu okupiĝos ankaŭ pri la mondaj sesioj de la KER-ekzamenoj.

Mia lasta vorto iras al vi ĉiuj, tutkore: **DANKON!**

Arlette PLUTNIAK

Mi ja intencis kontraŭbatali pere de "bureau d'octroi" kaj "joint de rail soudé par aluminothermie", sed unuflanke la federacia prezidantino Arlette PLUTNIAK tre oportune anoncis, ke la laboro de la ĝenerala asembleo tuj komenciĝos, kaj aliflanke mi ne vere kapablis respondi miajn proprajn demandojn.

Pro tio, ke Marianne paŝis al la maldekstra parto de la salono, mi tuj elektis seĝon en la plej dekstra parto, ĉar mia ĉefredaktoro komisiis min redakti artikolon pri la kongreso, do mi intencis aŭskulti la oficialajn raportojn plej serioze, ne zorgante pri kiaj ajn karbominejaj negravajoj.

Cetere, tiutage mi esceptokaze ne kunportis fotilon, ĉefe pro tio, ke kiam mi fotas, mi aŭdas nenion. Se mirigas vin tiu stranga rilato inter mia fotilo kaj miaj miringoj, ne hezitu intervjui cerbofakulon!

Nu, apenaŭ du minutojn poste, konstatinte ke mi nek fotas, nek tenas fotilon, nia vicprezidantino France VALET petis, ke mi fotu per ŝia fotilo. Eble pro la ĉi-supremenciita konflikto inter fotado kaj aŭskultado, sed pli verŝajne pro tio, ke mia maldekstra genuo kaj mia interna orelo kelkfoje estas eĉ pli maljunaj ol mi mem, mi preferis resti senmova sur mia seĝo. Mi humile esperas, ke France VALET iam pardonos min...



Kiam Arlette PLUTNIAK ekparolis esperantlingve kaj prononcis la vorton "Katja", mi tuj komprenis, ke nia ĝenerala membrokunveno daŭros nur duonon de la planita horaro. Arlette fakte intencis komisiis nian sekretariinon Katja BOEN traduki ĉion franclingven. Sed tiuj el ni, kiuj provis tiumatene babili kun Katja, ja sciis, ke, kvankam

ŝi kutime kapablas traduki kiun ajn frazon (krom eble kelkajn fakajn karbominejajn terminojn...), ŝi ne sukcesos dum la kongreso aŭdigi eĉ la plej mallaŭtan silabon.

Arlette unue memorigis nin pri nia ĵus forpasinta amikino Nicole BÉCANT, kaj petis momenton da silento. La emociplena teksto, kiun ŝi verkis kaj publike legis fine de la entombiga ceremonio, legeblas en ĉi tiu gazeto, apud la Arasa agadraporto.

Poste estis unuanime aprobitaj la federacia agadraporto prezentita de Arlette, kaj la financa raporto prezentita de nia kasisto Xavier VILAIN.

Ni entuziasme eksciis, ke, danke al la altkvalita dosiero pretigita de Michel DECHY, Xavier DEWIDHEM, kaj Julia HEDOUX, UEA decidis organizi en Lille la Universalan Kongreson de 2015! Arlette tiam rimarkigis, ke estrarano de Lille-Villeneuve-Espéranto tutcerte rilatus ege pli facile ol ŝi kun la lokaj oficialuloj, kaj devas do kandidatiĝi al prezidanta mandato. Kaj ŝi decidis refariĝi nura komitatano.

Xavier DEWIDHEM kaj Michel DECHY poste respondis kelkajn demandojn kaj sugestojn pri la programo de la U.K., pri la Esperanto-kursoj, kaj ankaŭ petis ĉies helpon cele al sukcesplena Universala Kongreso.

Sekvis mallonga sed sekreta kunsido de la federacia komitato, pri kio mi rajtas rakonti nur kion mi scias: la nova prezidanto de la Norda Federacio nomiĝas Michel DECHY.



Kiam alvenis Jean-Luc DEROO (urbestro de Halluin), ni rajtis (danke al la diskreta sed efika laboro de la LVE-anoj) trinki kaj manĝeti, aŭskultante la afablajn vortojn de Michel DECHY kaj Xavier DEWIDHEM, kaj la eĉ pli




afablan respondo de la urbestro, al kiu ni donacis ekzempleron de "La templo de l' suno". La Plena Analiza Gramatiko ja estus pli dika donaco, sed por komenconto ĝi eble estus malpli alloga...



La tagmanĝo disvolviĝis des pli agrable, ke la organizantoj regalis nin per bongustaĵoj, kaj ke miaj tri najbaroj Marcel DELFORGE (el Charleroi), Roland ROTSAERT (el Bruĝo), kaj Fabrice LEMAIRE (el Béthune) nek silentis nek krokodilis. Ĉu vi ne emas kredi min? Mi tamen certigas al vi, ke en *Halluin* vere okazis al mi tiu malofta miraklo!

Je la 15-a komenciĝis la prelega koncerto (aŭ ĉu la koncerta prelego?) de Gijom ARMIDE, titolita "Les 5 bons sens de l'espéranto". Dum preskaŭ du horoj li alterne aktorizis franclingve kaj kantis ambaŭlingve, virtuoze muzikante per elektronika klavaro. Dum la unuaj minutoj de la spektaklo mi timis, ke liaj malrapidaj paroloj pri la konataj temoj "Esperanto" kaj "daŭrigebla disvolviĝo" estigos iom da dormemo en la spektantaro, sed lia humuro, liaj originalaj vidpunktoj kaj

trafaj argumentoj, baldaŭ revigligis la mensojn. Interalie, li talente esperantigis famajn kanzonojn. Ekzemple, "Paroloj, paroloj" trafe ilustris la jenan temon: la mono elspezita de internaciaj institucioj por tradukadi ne plu disponeblas por agadi...



Nur unu aferon mi bedaŭris: la tro laŭta muziko ofte malhelpis bonan komprenon de la tekstoj. Redaktante ĉi tiun raporton, mi reaŭskultis sonregistraĵojn de la spektaklo, kaj denove spertis la samajn malfacilaĵojn. Mi do serĉis en la Interreto, kaj tre facile trovis en iu blogo du el la

kanzonoj kantitaj en *Halluin*, perfekte kompreneblaj... Post niaj entuziasmaj aplaŭdoj, Gijom donacis al ni ok-minutan kanzonon pri Dudu, en kiu mi klare aŭdis, ke Gijom estas kaj riisto kaj iĉisto. Tio signifas, ke li emas uzi la senseksan pronomon "ri" anstataŭ "li" kaj "ŝi", kaj la viran sufikson "-iĉ" same kiel la inan sufikson "-in".

Tiam restis nur tri farendajoj. La unuan mi plenumas nur hodiaŭ, dankegante al la organizantoj kaj al ĉiuj helpintoj, kiuj ebligis la agrablegan disvolviĝon de la kongreso. La dua konsistis en plia sesio de trinkado kaj aŭskultado de afablaj paroloj, ĉi-foje kun la eventuale onta urbestro de *Halluin*. Sed mi fakte tuj elŝteliĝis senbrue kun mia kunvojaĝanto, ĉar mia neesperantista edzino bezonis nian aŭton pro neesperantistaj kialoj. Tial mi nek partoprenis la duan farendajojn, nek vere scias, kio estis la tria... Eble temis pri la kutima neceso reordigi, purigi, kisi kaj brakumi, kaj finfine malgaje forveturi. Se tiel estis, mi tre dankas al mia edzino (krom koncerne la ne plenumitan kisdadon...!)

Raportis Jean HENNEBERT

## ENHAVO

### ASOCIAJ TEMOJ

Fede ★ Kongreso en Halluin	p1
Fede ★ Komitatkunsido de UFE	p3
E080 ★ Agad-raporto el Amieno	p5
E080 ★ Kio nun en Amieno?	p6
ArE ★ Agad-raporto el Araso	p6
ArE ★ Malĝojiga sciigo pri du el niaj karaj klubaninoj	p7
DuE ★ Agad-raporto el Dunkirko	p8
LVE ★ Agadraporto el LVE	p10
LVE ★ Vizito de Mikaelo Bronŝtejn	p10
LVE ★ Vesperaj ludoj en Lille	p11
VaE ★ Nova ZEO en la Nordfrancia departemento	p12
VaE ★ Agad-raporto el Valencieno	p13
VaE ★ Vivo de Valencienano : Pierre-Joseph FONTAINE	p14
Fede ★ Evoluo de la listo de la membraro	p14

## La Nordfrancia Federacio en UFE kaj UEA

# KOMITATKUNSIDO DE UFE

## De la dimanĉo 27-a de Januaro 2013

La sabaton 26-an kaj dimanĉon 27-an de Januaro 2013 kunsidis komitatanoj de *Espéranto-France* (UFE) en ties sidejo.

Inter multaj diversaj temoj estis pri-debatataj artikoloj plene koncernantaj la regionajn federaciojn kaj aliajn aligitajn organizojn. Tial estis emfazita la neceso, ke tiuj regionaj, lokaj, temaj asocioj estu nepre informitaj

pri la projektoj kaj decidoj de la UFE-komitato, por ke ili povu diskuti, difini kaj doni sian opinion pere de siaj reprezentantoj en la UFE-komitato.

Dum la kunvenoj de la 26-a kaj 27-a de Januaro ĉeestis de nia federacio: Julia HEDOUX, reprezentanto de la individuaj membroj, Michel DECHY, prezidanto reprezentanto de G.E.E., Claude LONGUE-ÉPÉE, reprezentanto

de la Norda federacio. Bedaŭrinde nia aktiva amiko *Xavier DEWIDEHEM* – kiu multe kaj kompetente laboris pri la temo de modifoj de la statuto – ne povis ĉeesti pro hospitala operacio; li ne povis priargumenti, per sia jura kompetento, siajn proponojn de modifoj.

*Mi substreku, ke nia kunveno havas nenian rilaton kun la manifestacio kaj parado organizita dimanĉe ĝis Bastille, favore al "Le Mariage pour tous : Samseksa interligiĝo" !! ...*

Mi provu ĉi-sube resumi kelkajn diskutojn kaj decidojn de la komitata kunsido. Ili estas prezentotaj kaj pri-debatotaj okaze de la Aprila membrokunveno de nia federacio, kiun ili ja koncernas:

- Statuto: eventualaj modifoj de la artikoloj 9 kaj 10.
- Kotizoj: modifo bazita sur eksperimenta sistemo de *Béziers*.
- Vendo de la nova *"Tinĉjo kaj la Templo de l' Suno"*.
- Kampanjo por *"Espéranto au Baccalauréat"*.

#### **Statuto, 9-a artikolo: Proporcio inter komitatanoj elektitaj de la individuaj membroj kaj komitatanoj delegitaj de la asocioj.**

Nun la 9-a artikolo precizigas, ke la nombro de la unuakategoriaj komitatanoj devas nepre superi la nombron de la duakategoriaj komitatanoj. Tiu regulo estas konservita, malgraŭ propono por forstreki ĝin.

#### **Statuto, 10-a artikolo: Reguloj regantaj la kunvokado kaj organizado de Eksterordinaraj Membro-kunvenoj.**

Estos proponita nova regularo por ebligi: balotadon perkorespondan; kunvokadon perretan; malpliigon de la tempo inter kunvokado kaj kunvenado (ekzemple: trisemajna anstataŭ dumonata; malpliigon de la tempo inter unua baza senkvoruma kaj dua kroma findecida kunveno (ekzemple: nur unutaga, okaze de nacia kongreso; aŭ 18 monatoj).

La celo estas: ŝpari tempon; ŝpari elspezojn; per simpligo de la kunvokado.

Kotizoj, *Béziers*-sistemo de komuna interasocia aliĝo (UFE + regiona Federacio + loka Grupo).

Ekzemple por nia federacio, kaj ĝiaj lokaj grupoj, kaj ĝiaj ĝisnunaj simplaj UFE-membroj:

Unusola aliĝilo eldonita de UFE, resendota al UFE kun la pago de la sumo, kaj pritraktota de UFE (ja rajtigita kiel *"Association reconnue d'Utilité Publique"*) kun la impostservoj, por malpliigi la impostojn de

la membroj, je 66 % malpli, el ĉiuj pagitaj membrokotizoj – principe ne inkluzivantaj la pagon por la abono de la respektivaj revuoj LME kaj NG):

La ciferoj de la ĉi-suba komparo inter la nuna situacio kaj la eventuale nova situacio estas provizoraj kaj modifeblaj laŭ niaj proponoj. Ili estas bazitaj sur la teoriaj sugestoj faritaj de UFE, kaj sur la nuna dispartigo inter la nunaj kotizoj al la Norda federacio (NF) kaj al la loka grupo – en nia ekzemplo: *"Lille-Villeneuve-Espéranto"* (LVE).

## **Nuna situacio**

### **Por iu simpla membro de UFE:**

Kotizo al UFE .....39,00 €  
 Fina elspezo, post imposta rabato  
 $39 \times (1 - 0,66) = \dots\dots\dots 13,26 \text{ €}$

### **Por iu simpla membro de LVE kaj NF, ne UFE-ano:**

Kotizo al LVE.....13,00 €  
 Kotizo al la federacio NF .....7,00 €  
 Abono al NG (enspezita de NF).....6,00 €  
 Fina elspezo (sen ebleco de imposta rabato).....**26,00 €**

### **Por iu membro de UFE + LVE + NF:**

Kotizo al UFE .....39,00 €  
 Kotizo al LVE.....13,00 €  
 Kotizo al federacio NF .....7,00 €  
 Abono al NG (enspezita de NF).....6,00 €  
 Fina elspezo post imposta rabato  
 $39 \times (1 - 0,66) + (13 + 7 + 6) \times 1 = 13,26 + 26 = \dots\dots\dots 39,26 \text{ €}$

## **Situacio kun interasocia aliĝo pere de UFE**

### **Ĉiu membro el la tri kategorioj fariĝas membro de UFE + LVE + NF:**

Malpliigita kotizo al UFE; de 39 € al (ekzemple).....30,00 €  
 Neŝanĝita kotizo al LVE.....13,00 €  
 Neŝanĝita kotizo al NF .....7,00 €  
 Abono al NG (sen ebleco de rabato de imposto).....6,00 €  
 Fina elspezo post imposta rabato el la tuta kotizo, sen la abono  
 $(30 + 13 + 7) \times (1 - 0,66) + 6 \times 1 = 17,00 + 6 = \dots\dots\dots 23,00 \text{ €}$

### **Ĉiuj membroj de la federacio trovas avantaĝon en aliĝo al UFE, kun interesa kotizo.**

**La nunaj membroj de nur UFE – por nur kromaj 9,74 € - havos avantaĝon de abono al NG kaj aliaj servoj de LVE kaj NF.**

### **Alia objektiva avantaĝoj de la proponita sistemo estas:**

Allogi al membriĝo al UFE danke al malpli alta kotizkosto. Pligravigi ties membraron. Tiel pli bone diskonigi la agadojn de UFE. Kaj plibonigi la financon situacion de UFE por ebligi novajn eksterajn agadojn.

Debato pri la problemo dum la Nord-federacia komitatkunsido de la 6-a de

Aprilo en Araso.

Informite pri la propono de unusola kunigita kotizo laŭ la ĉi-supraj ekzemploj, la lokaj grupoj de nia federacio sciigis sian sintenon pere de siaj reprezentantoj en la komitato. Unu loka grupo tute kontraŭas la proponon.

La plejmulto de la grupoj estas favora al la principo proponita. Sed ĉi tiuj konsideras, ke ĝia teksto estu zorge kaj detale prilaborota:

- a) konsiderante la kazon de membroj ne pagantaj impostojn;
- b) lasante al ĉiu membro eblecon individue konservi sian nunan kotiz-sistemon;
- c) konsiderante, ke la redakto kaj la apliko de regularo de la sistemo star-

igos multajn komplikajojn...

La reprezentanto de la federacio en la UFE-komitato, raportos al tiu instanco pri tiuj rimarkoj...

### Vendo de la nova "Tinĉjo kaj la Templo de l'Suno"

Propono de vendotarifoj, prezentita de *Michel DECHY*.

Sed ne alprenita de la komitato, kiu ja decidis prokrasti la fiksadon de nova tarifo.

Estas 3000 ekzempleroj de la albumo, pagitaj al *CASTERMAN* po 7,5 € (+ sendokostoj) por ĉiu albumo. Kaj kiuj estas vendotaj laŭ la jenaj vendokostoj:

	Kosto	kun sekva profito por 1000 ekz.
Por unuopa individua aĉeto	12,50 €	5000 €
Por aĉeto de 10 ekzempleroj	10,50 €	3000 €
Por aĉeto de 100 ekz. (libroservo)	8,50 €	1000 €

### Kampanjo de subskriboj por peticio "Espéranto au Baccalauréat"

Estis kolektitaj entute 33 000 sub-

skriboj. Kaj la responsoj kolektis kontentigan nombron de esperantistoj rajtigitaj de la Instruada Ministerio, por proponi tekston de ekzamenero, por korekti la taskojn kaj por ekzameni eventualajn kandidatojn pri Esperanto.

La taskoj kiuj restas nun farotaj estas:

- Skribi al parlamentanoj kaj eminentuloj, kiuj jam sin deklaris favoraj.
- Prepari kvarpaĝan dokumenton resumantan la subskribojn kaj ties enhavon.
- Prepari amaskomunikilan konferencion por venigi ĵurnalistojn.
- Prezenti la peticion al la ministro pri Nacia Instruado.

Ĉiuj ĉi-supraj problemoj estis jam detaligitaj por aprobo okaze de nia federacia membrokunveno de Aprilo 2013.

Sed ne estas tro malfrue por ke niaj membroj povu sciigi siajn personajn rimarkojn aŭ kritikojn al *Claude LONGUE-ÉPÉE*. Li prezentos tiujn rimarkojn okaze de la Oktobra Komitata Kunsido de UFE.

Resumis kaj komentis  
Claude *LONGUE-ÉPÉE*

## El Amieno

# Agad-raporto el Amieno

### Ni ŝanĝas niajn statutojn

La ĉefa ŝanĝo estas, ke ni ne plu havos prezidanton, nek kasiston, nek estraron. Ni interkonsentis, ke niaj decidoj estu alprenotaj de 16-membra kolektivo, en kiu ĉiu havas la samajn rajtojn. La membroj de tiu kolektivo estos, tre baldaŭ, oficiale deklaritaj je la prefektejo de la departemento *Somme*. Ĉiu membro povas (eĉ devas) sin engaĝi en unu aŭ kelkajn respondecajn rolojn, sole aŭ kun kelkaj aliaj, post konsento de la kolektivo. Restas al ni decidi, ĉu ĉiuj tiuj roloj, aŭ nur kelkaj, la plej gravaj, estu pri- kaj enskribitaj en nian internan regularon.

### La kursoj

- 1) La plej alta nivelo: ĉeestas 4 personoj, kiuj praktikas tradukadon, interpretadon, tekstverkadon.
- 2) BEK3-a nivelo: ĉeestas 3 personoj
- 3) BEK2-a nivelo: ĉeestas 6 personoj
- 4) BEK1-a nivelo: ĉeestas 3 komencantoj

### Gimnazio *Jean-Marc LAURENT*

De du jaroj, du el ni vivigas liber-tempan Esperantan klubon en tiu gimnazio. Ni volis ne fari kurson, sed alkiutimigi la junulojn al Esperanto per ludoj kaj per korespondado kun eksterlandanoj (korespondado, kiun ni tradukas dusence). La unuan jaron ni havis 4 lernantojn. La duan, sep.

Ĉijare, estas strange: komence ni havis 12 lernantojn, kiuj iom post iom malaperis, kaj subite grupo de 8 amikoj venis, tiom por ridi kiom por praktiki Esperanton.

En tiu gimnazio prelegis *Trevor STEELE* kaj *Mikaelo BRONŝTEJN*. Ĉi lasta sukcesis interesi eĉ la plej malbonajn lernantojn. "Estis la plej bona geografia kurso de la jaro", diris lernanto al sia instruistino!!!

### Turneoj de eksterlandaj esperantistoj

Ni preskaŭ ĉiam envicigas nian klubon en la turneojn de eksterlandanoj. Tre ofte ni invitas neesperantan publikon al la prelegoj

kaj interpretas en la francon. Ofte venas ĉirkaŭ 40 personoj (esperantistoj kaj ne). La prelegoj estas ĉiam sukceso. Ili sufiĉas por vekti simpatian al Esperanto, sed ne por allogi novajn lernantojn.

La vizito de eksterlandanoj estas ankaŭ bona okazo por Esperante prezenti nian urbon, ĝiajn pejzaĝojn kaj monumentojn kaj kunveni tutamike kun la invititoj. Kelkaj el niaj membroj daŭre

korespondas kun Mikaelo kaj pretigas vojaĝon al Sankt-Peterburgo kaj en BET (Baltiaj Esperanto-Tagoj).

Redaktis **Daniel DEVIS**

## El Amieno

# Kio nun en Amieno?

### Ĉeĥo en Amieno

La grupo de Amieno akceptis Petron **CHRDLE**. Merkredon la 19an de Junio vespere en Salŭelo, li prelegis pri sia lando, montrante kiom bela kaj protektita de UNESKO estas multaj lokoj en Ĉeĥio. Li ankaŭ parolis pri sia hobiaj: Esperanto kaj eldonado (li prezentis al ni librojn, kiujn li proponis por aĉeto).

Tiel pri li traktas Vikipedio:

"*Petr CHRDLE* [ĥr-dle], (naskiĝis la 12-an de Marto 1946), nomata Petro, estas ĉeĥa esperantisto, posedanto de la agentejo **KAVA-PECH**, iama prezidanto kaj nuntempa vicprezidanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (kaj ekde 2008 ĝia honora membro), rajtigita

ekzamenanto de **ILEI** kaj verkinto de lernolibro "*Esperantem za tři měsíce*" ("Per esperanto dum tri monatoj") kaj Profesia uzo de Esperanto kaj ĝiaj specifaj trajtoj."

### Nova "kroma" retejo por Esperanto 80

Krom la oficiala retejo de Esperanto 80 [www.esperanto80.org](http://www.esperanto80.org), **Pascal CADART**, vic-prezidanto pri retejoj kreis novan blog-retejon je le adreso:

<http://esperanto-80.blog4ever.com>

En tiu ĉi retejo **Pascal** enretigos la plej freŝajn novaĵojn, kiujn la membroj ricevas ret-mesaĝe en leterkestojn, sed kiujn ili ofte perdas pro tro rapida viŝado aŭ simple ne retrovas en tro plen-plenaj ret-mesaĝiloj.

### Ĝemeligo kun Dortmund

Amieno jam de 50 jaroj estas ĝemeligita kun germana urbo Dortmund.

Pro tiu jam kreita fadeno inter la du urboj, Esperanto 80 imagis uzi ĝin helpe de la esperantista UEA-reto por starigi ion novan sur malnovan aferon.


Respondecas pri tio **Bernadette MANIER** kiu kontaktis la UEA-delegiton de Dortmund. **Jifi**, la delegito de Dortmund, jam respondis al ŝi (la interŝanĝoj aperas en la blog je la adreso <http://esperanto-80.blog4ever.com>).

Ŝajnas, ke la ideo estas bona.


Parte redaktis **Cyrille DÉCOUTURE**

## El Araso


# Agad-raporto el Araso

 **La 17-an kaj la 18-an de Novembro 2012**, energie instigitaj de la trafaj argumentoj, vipo, skurĝo, kaj knuto de **Arlette** kaj **Edmond PLUTNIAK**, pluraj el niaj asocioj obeeme partoprenis en la Eŭropa Rendevuo de *Stella-Plage*, energie organizita de niaj gesamideanoj **PLUTNIAK Edmond** kaj **Arlette**.

**Sabaton la 1-an de Decembro** ni starigis Esperanto-budon ĉe la  Arasa asoci-forumo, sed tio neniom kreskigis la membraron de nia asocio.

 **Jaŭdon la 6-an de Decembro** la Arasa lingva fako de la Artea Universitato organizis t.n. lingvan kafejon. Pluraj asocioj ĉeestis.

Estis decidite okazigi tie kelkajn Esperanto-kursojn en 2013. Por allogi studentojn necesos tamen reklami ĉe la universitato komence de la venonta lernojar.

 **London la 17-an de Decembro** okazis la ĝenerala membrokunveno de nia asocio. Ĉeestis dek sep asocioj, kiuj (eble pro la ĉi-supre menciitaj vipo kaj knuto) senhezite aprobis kaj la agadan kaj la financon raportojn.

Ili poste aprobis la jenajn projektojn por 2013:

- inaŭguri straton de Esperanto en *Wavrans-sur-Ternoise*,
- estigi Esperanto-kursojn en la Arasa universitato,
- pliafoje partopreni en la Arasa Libro-

- Salono,
- organizi en Aŭgusto unutagan restadon en *Stella-Plage* (kadre de la festivalo "*Piano Folies*"), por aŭskulti la faman esperantistan pianiston **Andreo KOROBEJNIKOV**,
- kaj kompreneble partopreni en diversaj federaciaj, naciaj, aŭ eksterlandaj aranĝoj.

Ili finfine decidis, ke **Jacky RAMON** restos prezidanto, **Didier TOULLER** vicprezidanto, **Daniel WITRANT** kasisto, kaj **Arlette PLUTNIAK** vickasistino, dum **Jeannine RAULT** fariĝis sekretariino, kaj **Hélène MAZZEGA** vicsekretariino.

**Merkredon la 30-an de Januaro**, invitita de **LVE**, Mikaelo **BRONŝTEJN** prelegis kaj kantis en *Lille*. Tri el niaj klubanoj ĉeestis, kaj tute ne bezonis

skurĝadon por vigle aplaŭdi lin.

★ **Mardon la 9-an kaj jaŭdon la 11-an de Aprilo** en la urbo *Lens*, du el niaj klubanoj prezentis Esperanton al du gimnaziaj klasoj.

★ **Dimanĉon la 14-an de Aprilo** en *Halluin*, naŭ Arasanoj partoprenis en la matena laboro de la federacia kongreso, kaj dek unu aplaŭdis la posttagmezan prelegon-koncerton de Gijom **ARMIDE**.

★ **Ĉiulunde** okazas en Araso niaj Esperanto-kursoj, kaj dek ok ge-klubanoj regule ĉeestas kaj aktive

laboras en la sama grupo. Ĉiufoje instruas nur unu persono: jen **Arlette PLUTNIAK**, jen **Marianne DUNLOP**, jen **Edmond PLUTNIAK**, jen **Jean HENNEBERT**, kaj tiel ĉiu instruanto laŭvice refariĝas lernanto.

★ En *Nœux-les-Mines* la kursoj gvidataj de **Jean HENNEBERT** okazas ĉiumarde je malalta nivelo, kaj ĉiuvendrede por la progresantoj. En Septembro ree aliĝis ses plenkreskuloj, sed unu el ili poste transloĝiĝis al Bordoizio. Tamen restas ses gelernantoj, ĉar ok-jara knabo ofte akompanas siajn gepatrojn, kaj iom post iom progresas.

**Nia retejo:**

<http://arras.esperanto-nord.org>

**Nia adreso:**

**Office Culturel**

61 Grand'Place

62000 ARRAS.

**Esperanto-kursoj**

- en Araso: lunde de la 18-a ĝis la 20-a (krom dum ferioj).

- en la MJC de *Nœux-les-Mines*: marde kaj vendrede de la 18-a ĝis la 20-a (krom dum Aŭgusto).

Raportis **Jean HENNEBERT**

## El Araso

# Malĝojiga sciigo pri du el niaj karaj klubaninoj

Nia honora prezidantino **Michèle SUEUR** forpasis la 1-an de Decembro 2012. Ŝi estis kunfondinto de nia asocio, kaj aktiva membro de Eŭropo-Demokratio-Esperanto, sur kies voĉdoniloj aperis ŝia nomo en 2004 kaj 2009. Multaj asocioj ĉeestis la entombigan meson, ĉe kies fino ili laŭvoĉe recitis esperantlingvan preĝejon.



*Nicole BÉCANT inter siaj geamikoj de Arras - Espéranto, la 9-an de Junio 2012, okaze de la unua tutmonda sesio de KER-ekzamenoj.*

Nia instruantino **Nicole BÉCANT** forpasis la 8-an de Aprilo 2013. **Arlette PLUTNIAK** verkis la ĉi-postan emociplenan tekston, kaj publike legis ĝin la 13-an de Aprilo 2013 en la kirko de *Penin*, fine de la entombiga ceremonio de nia amikino. Nia prezidanto **Jacky RAMON** tuj poste legis la franclingvan version.

Raportis **Jean HENNEBERT**

**La teksto verkita kaj legita de Arlette PLUTNIAK en la kirko de Penin**

*“Nicole, lastan fojon ni parolas al vi en Esperanto.*

*Vi tiom abrupte forlasas nin, ke ni apenaŭ povas kredi, ke neniam plu ni revidos vin.*

*Ni deziras atesti al vi nian amikecon, nian rekonon pro via sindonemo al nia nobla idealo. Vi dediĉis tiom da tempo, tiom da energio, por prepari viajn kursojn; vi neniam hezitis veturi ĉiusemajne dekojn da kilometroj de via fora vilaĝo Penin ĝis Araso. Viaj multnombraj lernantoj, al kiuj vi ameme instruis la lingvon, multon ŝuldas al vi, ili ĉiam gardos en siaj koroj vian memoron.*

*Ankaŭ la tuta Norda Federacio neniam forgesos la pasintjaran kongreson, kiun vi brile organizis en Wavrans-sur-Ternoise, kaj vian volon restarigi la tombon de Émile GROSJEAN-MAUPIN, unu el la pilieroj de nia movado. Vi mirinde sukcesis!*

*Kiom grandaj estis viaj ĝojo kaj fiero, tiutage malkovrigi al la esperantistoj la belan preĝejon de Fiefs, kies arkitekturo kaj vitraloj estas verkoj de via patro! Ni konservos en niaj koroj ĉiujn entuziasmajn momentojn, kiujn ni travivis kune. Vi multe mankos al ni, Nicole.*

*Certe vi jam retrovis la karmemorajn forpasintojn de nia asocio: vian edzon Max, Annie, Marguerite, Marie-Lou, Louise, Daniel, Thadée, Julia kaj Michèle; kune vi helpu nin, por ke nia agado daŭre prosperu.*

*DANKON Nicole, ni neniam forgesos vin. Estos granda malpleno sen vi. Ripozu en paco.”*

Verkis **Arlette PLUTNIAK**



*La renovigita tombo de Émile GROSJEAN - MAUPIN en Wavrans-sur-Ternoise.*

## Urbodomaj ekspozicioj en Bulonjo-ĉe-Maró

### Kion do ili tuj proponos al ni?

Ekde 2007, ĉiusomere, la ĝardenistoj de la urbo Bulonjo-ĉe-Maró transformas la urbodoman placon en parkon por vagadejo kaj malkovradejo.

Dum ĉiuj tiuj pasintaj jaroj, niaj ĝardenartistoj elmontris, por nia plej granda feliĉo, pli kaj pli da imago, kaj iliaj humuraj artkreaĵoj surprizas kaj mirigas la vizitantojn.

Ni ne citos al vi ĉiujn variaĵojn, al kiuj al kutimiĝis la pavimoj de la malnova placo *Godefroy DE BOUILLON*, historia

monumento. Tamen, ĉi tiu estas aranĝita tiamaniere, ke la vizitantoj povu: jen unu jaron, promeni "en pentraĵo" de *CAILLEBOTTE*; jen alian jaron observi la batalon de la naturo kontraŭ la veturiloj kaj vidi papilarbon, florumitan de monpunaj paperoj, aŭ ankaŭ frandemiĝi antaŭ grandegaj "Carembars".

En 2012, paralele kun la "Pompidou Mobile", la urbodomo naskis la "Centre POMPIDOU". Tiel do la publiko promenis inter exemple: verko de *DUBUFFET*, telermeblo ornamita laŭ

ties maniero; verkoj de *MONDRIAN*, de *Sonia DELAUNAY*, la el floroj farita kopio de pentraĵo; aŭ ankaŭ, ni povis alproksimiĝi al la bovino de *Niki DE SAINT PHALLE*, ktp.

Ni konsilas al vi virtualan viziton per Interreto, kaj same kiel ni, certe vi atendos kun infana malpacieneco, la venontajn "Efemerajn ĝardenojn de Bulonjo-ĉe-Maró".

Por la grupo de Bulonjo-ĉe-Maró redaktis *Renée TORDEUX*

## El Dunkirko

### Agad-raporto el Dunkirko

**Sabaton la 23an de Marto 2013**, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigis budon en la 9a Salono pri Lingvoj en la interurba komunumdomo de Dunkirko, proponita de la asocio "Association pour le développement des langues sur le littoral dunkerquois (ADLLD)". Ĉirkaŭ 1500 vizitantoj povis ekkoni la agadojn de la klubo.

**La 6an de Aprilo 2013**, *Xavier VILAIN* partoprenis en la kunveno de la Federacia Komitato (*Espéranto-Nord*), en la "Office Culturel" de Araso.

**La 14an de Aprilo 2013**, unu klubano partoprenis en la kongreso de la Federacio *Espéranto-Nord* en Halluin (59).

**Sabaton la 18an de Majo 2013**, nia asocio *Dunkerque-Espéranto* starigis budon en la 1a Salono pri Libro en la urbeto *Coudekerque-Village*, apud Dunkirko.

**Merkredon la 26an de Junio 2013** okazos la 21-a ĝenerala membrokunveno de nia asocio, en la kutima kunvenejo "Brossolette".

**La 18an de Septembro 2013** okazos la informkunveno de *Dunkerque-Espéranto*.

**Merkredon la 25an de Septembro** rekomenciĝos la Esperanto-kursoj (dufoje monate).

Fine de Septembro 2013, kelkaj membroj de la klubo "Krefeld-Espéranto" (Germanio) venos en Dunkirkon por viziti la Dunkirkajn esperantistojn. Krefeld estas urbo ĝemeligita kun Dunkirko.

Raportis *Xavier VILAIN*

### El Dunkirko "ĜI RESTAS SENVIVA"



Poemo verkita en Esperanto de *Théodore MACAIGNE*; poemo aperinta en "PENSEO" de Marto 2013.

De la ĉi-suba poemo, la juna aŭtoro estas nova lernanto de la elementa Esperanto – kurso de Dunkirko. Li eklernis la lingvon nur en Septembro 2012... Kaj de tiam li membriĝis en la Dunkirka Esperanto-grupo.

Gratulojn al la juna poeto, pro lia rapida esperantistiĝo! Kaj gratulojn al la kursgvidanto pro la rapida kaj efika kurso!

La redaktoro, *Claude LONGUE-ÉPÉE*

### ĜI RESTAS SENVIVA

Ni marŝas sur ĝi,  
Ĝi nenion diras.  
Ni kraĉas sur ĝi,  
Ĝi ne moviĝas,  
Ĝi restas senviva.  
Al ĝi, ni povas ĉion fari.  
Ĝi povas ĉion sperti.  
Sur ĝi monstra pezo,  
La venton, la neĝon, la pluvon,  
Ĝi restas senviva.  
Kaj ni povas detruĝi ĝin,  
Por konstrui ion,  
Aŭ simple por detruĝi ĝin,  
Ĝi diras ĉiam nenion.  
Ĝi restas senviva.  
Mi ne parolas pri la grundo,  
El pavimeroj, el betono;  
Sed pri la homaro.  
Ĝi spertas la terurecon.  
Ĝi restas senviva.  
el:



Verkis *Théodore MACAIGNE*



## El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

# Agad-raporto el LVE de la 1-a de Januaro ĝis la 31-a de Majo

### Ĉiumonataj renkontoj

Ĉiun trian ĵaŭdon de la monato (escepte en Junio kaj Aŭgusto). Je la 18-a h. 30; en la "Tenisa Klubo FOS", en Villeneuve-d'Ascq.

### Ĉiusemajnaj kursoj

#### En la Universitato LILLE III

Ĉiun mardon, de la 18-a h.15 ĝis la 19-a h.45 > por komencantoj (ĉirkaŭ 5 lernantoj).

Kaj dufoje monate lundon, je la sama horo > por praktikantoj, (ĉirkaŭ 3 lernantoj).

Instruanto de la du niveloj: *Michel DECHY*.

#### En la Kvartala Domo de la Centro de Lille

Ĉiun mardon, je la sama horo > por komencantoj (ĉirkaŭ 4 lernantoj).

Instruanto: *Katja BOEN*.

#### En Bersée

Ĉiun lundon, de la 18-a h.30 ĝis la 20-a h.00 > por "progresantaj-komencintoj" (7 lernantoj).

Instruanto: *Claude LONGUE-ÉPÉE*.

### Someraj staĝoj

De la 8-a ĝis la 12-a de Julio, de la 18-a h.30 ĝis la 20-a h.00 > 5 seancoj por malkovri la lingvon. Same de la 26-a ĝis la 30-a de Aŭgusto.

Instruas: *Michel DECHY*.

Poste, kelkaj lernintoj daŭrigas la lernadon dumjare.

### Kursoj en Universitato pri Libera Tempo

10 seancoj po 2 horoj por ĉiu > vendrede matene, de la 10-a h. 00 ĝis la 12-a h. 00.

Ĉi-jare por nur 2 komencantoj.

Instruas: *Michel DECHY*.

### La klubo ĉe Interreto:

[www.lve-esperanto.org](http://www.lve-esperanto.org)

Multaj informoj pri la diversaj agadoj de nia klubo aperas en tiu bonega informilo.

Sufiĉe ofte homoj kaj ĵurnalistoj

kontaktas nin post vizito de tiu "fama" adreso, kies zorgantoj estas *Xavier DEWIDHEM* kaj *Katja BOEN*.

### Prelegoj kaj prezentado de la lingvo Esperanto

Kadre de la "Kulturaj Semajnoj", prezentado de la lingvo en la Kolegio "SAINT-EXUPERY" de Hellesmes. La 9-an, la 10-an kaj la 11-an de Aprilo, la ses klasoj de la unua nivelo ("6-a") ricevas "bonajn" informojn pri Esperanto, fare de *Michel DECHY*.

Ĉiujare la bazaj lernejoj, proksimaj al la hejmo de *Michel DECHY* (t.e. "Anatole FRANCE" kaj "PICASSO"... ) invitas lin. Li proponas 3 seancojn po 1 horo kaj duono por ĉiu: prezentado de Esperanto, kurso pri matematiko en Esperanto, kaj fine japana "Sorobano" ankaŭ en Esperanto.

Ĉi-jare, okaze de la eldono de "Tinĉjo", la televido ĉeestis dum la dua leciono en "PICASSO". Poste aperis raporto ĉe la televidkanalo "FRANCE 3".

Novajo en 2013: kune kun la urbaj asocioj, kiuj zorgas pri instruado en bazaj lernejoj, estos sama prezentado en la lernejo "VERHAEREN". Sed nia asocio "LVE" devus ricevi monhelpon pro tia agado. Do ni povas ĝoji pri tiu "valorigo" kaj oficiala agnosko de niaj prezentantoj.

La 30-an de Januaro, *Mikaël BRON-ŠTEJN* prelegis en la MRES pri la ĉefurboj de Rusio. Estis kiel kutime elstara prezentado. Poste li regalis nin per siaj belaj kaj kortuŝaj kanzonoj. La 2-an de Aprilo, en la urbo *Roubaix*, laŭ organizo de "Union Rationaliste Métropole Nord", *Michel DECHY* prelegis antaŭ 15 homoj. Estis kutima prezentado de "nia kara lingvo", sed ankaŭ emfazo pri la interna ideo...

Denove la 11-an de Junio, li prelegis en la urbeto *La Bassée*, invitate de la asocio "NORD-MADAME"... Kian plezuron li havis kun tiom da virinaj oreloj por lin aŭskulti!!

"NORD-MADAME" estas asocio nur

por virinoj en diversaj urboj de la Norda regiono.

### Specifaj budoj okaze de diversaj aranĝoj

Okazos Festivalo pri la bildstrioj en *Lys-Lez-Lannoy*: la 9-an kaj 10-an de Novembro 2013.

Dankon al ĉiuj deĵorontoj kaj vizitontoj!

### Ekzamensesioj en Araso kaj en la MRES de Lille

Skriba kaj parola parto de la KER-ekzamenoj B1, B2 kaj C1 okazis en Araso la 8-an de Junio 2013.

FEI-ekzamenoj okazos en MRES, dimanĉon la 23-an de Junio 2013.

### Renkonton kun "La Konkordo" de Kortrejko

Niaj grupanoj estas invititaj partopreni la "Tagon de la Flandraj Ardenoj", la dimanĉon 26-an de Majo 2013.

### Partoprenoj en diversaj aranĝoj

Kvar klubanoj de LVE ĉeestis "PSI", la Printempan Semajnon Internacian en Germanio, en la Harca-Montaro, meze de la lando.

La ĉefaj roluloj de la aranĝo estis la ege abunda neĝo, kaj la malaltega temperaturo. Sed la etoso estis kiel kutime agrabla kaj varma.

### Konversaciaj Rondo

De kelkaj monatoj, tri el niaj klubanoj organizas unufoje ĉiumonate konversaciajn rondojn en Lille, en "Le Café Citoyen". Pere de paroligaj ludoj, la partoprenantoj siavice ion rakontas, daŭrigante anekdoton... Kaj ili tre amuziĝas! Gravas unu regulo: paroli nur en Esperanto. Tiuj rondoj estas kompreneble malfermitaj al ĉiuj.

### UK-2015 de UEA okazos en Lille

Post la vizito en Lille de *Osmo BULLER* kaj *Clay MAGALHES*, kiuj

responsas pri la organizado de la diversaj UK-oj.

Danke al la bela prezentado de nia dosiero farita de *Xavier DEWIDHEM* kaj de la lokaj turismaj kaj urbaj instancoj, ni ege ĝoje informas, ke la estraro kaj instancoj de UEA elektis nian urbon *Lille* por organizi la 100-an UK-on.



### “La Templo de l’ Suno”

Aperis fine de 2012 nova Esperanta traduko de Tinĉjo “*La Templo de l’ Suno*”.

Dankon al *Hervé GONIN*, kiu estas denove la tradukinto.

Redaktis *Michel DECHY*  
kaj *Katja BOEN*



## El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

# Vizito de Mikaelo Bronŝtejn “Ĉefurboj de la Rusa Ŝtato”

Nekontesteble nia rusa amiko, aŭtoro-kanzonisto, Mikaelo **BRONŜTEJN** ŝatas nian landon, nian regionon, nian Esperanto-grupon, nian urbon.

Li ja denove estis en *Lille*, vespere je la 30-a de Januaro 2013 – antaŭ ol iri al Amieno kaj fine al Parizo – por prelegi, gitarludi kaj kanti en *MRES* (Domo Regiona de la Medio kaj de la Solidareco). Li estis gastigata, kiel kutime, de nia aktivulino *Katja*.

Ĉeestis 17 gesamideanoj, de *Lille* kaj Araso, ĉirkaŭ la tablo de la *MRES*-a salono.

Antaŭ ol lasi la parolon al nia invito, *Edmond PLUTNIAK* emfazis pri la reliefigo en la amaskomunikiloj de nia lingvo kaj de nia regiono. Li unue raportis pri la intervjuo de *Michel DECHY* sur la kanalo *France3* pri la eldono de la nova albumo de Tinĉjo en “*La Templo de l’ Suno*”; kaj due li raportis pri la interveno de *Jacky RAMON* sur la radio-elsendejo de *France-Inter*, kie, gajninte konkurs-premion, li precizigis, ke li praktikas Esperanton kaj aktivas en la Esperanta movado.

Poste intervenis *Michel DECHY*. Li dankis al *Katja* kaj al Mikaelo, kaj li donacis al ĉi-tiu unu albumon de Tinĉjo, petante ke ĉiuj ĉeestantoj subskribu la frontpaĝon kaj skribu kelkajn vortojn danke al nia invito. Tiam Mikaelo, rememoriginte ke, inter pluraj de li proponitaj preleg-temoj (kelkaj estis tre fakaj, ekzemple

pri la juda influo en la rusa poezio), ni estis elektintaj “*La ĉefurboj de la Rusa Ŝtato*”, li precizigis, ke li prelegos pri tio dum kvardek kvin minutoj, kaj ke samdaŭre li kantos specimenaron de kantoj el sia lasta disko.



**Estas por ĉiuj ĉeestantoj vera ĝuo aŭskulti la preleganton. Li majstre regas la temon, kaj perfekte klarigas ĉion. Li montras kaj lerte komentas belajn bildojn por ilustrati la diversajn ĉefurbojn, kiujn li priskribas.**

**Li kaptas la okazon klarigi tiel la bazon de la temo pritraktita:**

*“Printempe de la jaro 2003 rusaj vojkonstruantoj urĝege sed bonkvalite riparis la 120-kilometran ŝoseon de Sankt-Peterburgo ĝis la rivero Volhov. Ĉu tio estis farita pro la 300-jara jubileo de Sankt-Peterburgo? – Tute ne. Apudis ne tro vaste konata, sed ankaŭ grava historia datreveno: la 1250-jariĝo de Staraja Ladoga, la unua rusa ĉefurbo. La jubileo tamen estis agnoskita, kiel ŝtate grava, ĉar venis al Staraja Ladoga mem la*

*Prezidento Vladimir PUTIN. Jen por kio estis riparita la ŝoseo!...”*

Dum la pasintaj 1 250 jaroj la rusoj plimalpli regule translokigis sian ĉefurbon, kaj la historio de ĉiuj translokigoj estas treege amuza kaj instrua. Pri ĉiuj urboj, kiuj rolis kiel rusaj metropoloj, rakontas la preleganto.

Por prezenti kaj ĝustigi la nombron de la ĉefurboj florintaj en Rusio, la preleganto precizigas, ke la slava popolo ne estis tute perfekte homogena je la komenciĝo de la postkrista erao. Ĝi fakte konsistis el pluraj (multaj) triboj, kiuj plej ofte havis malamikajn rilatojn.

Fakte estas distingeblaj tri ĉefaj triboj: la okcidenta tribo el Balkanoj; la suda tribo el Ukrainio-Krimeo; kaj la norda tribo. Tiu-ĉi lasta tribo devenas fakte de tricentjara batalado kaj invadado al Skandinavio fare de kelkaj sudtribanoj, kiuj decidis kuniĝi en Peterburgo kaj iniciati ambasadon al la vikingoj.

De tiu norda ĉefurbo, *Staraja Ladoga*, sur la bordoj de la *Ladoga*-lago – kies 1200-jara jubileo estis festita en 2003 – ni povas vidi fotojn de spuroj de belaj konstruaĵoj, inter kiuj estas beleta blanka preĝejo.

Poste estas Kievo, fondita de tri gefratoj (ciganoj) ĉe la rivero Dnepro. Tiam kaj tie naskiĝis, en 950 post Kristo, la ortodoksa religio pere de *Vladimir* la Hela... Kaj fakte la rusa ŝtato.

Alia grava reĝo estis *Jaroslav La Saĝa*, kies iu filino *Ana* iĝis edzino de franca reĝo. Temas pri Henriko la unua, kiu regis de 1031 ĝis 1060, kaj kies dua edzino estas ja konata en Francio kiel *Ana* de Kievo aŭ *Ana* de Rusio, kiu fondis la abatejon *Saint-Vincent*.

Kaj, sur ora ringo sesdek kilometra ĉirkaŭ la nuna Moskvo, ekstaris diversaj ĉefurboj, pli malpli malamikaj unuj kontraŭ la aliaj. Precipe estis Vladimir-Urbo, inter Kievo kaj Moskvo. Kaj tie en la jaroj 1247 ekstaris iu urbo *Muskav* – tataro nomo – kiu estiĝis Moskvo.

De tiu ĉefurbo ni povas admiri fotoĵojn de belaj monumentoj, konstruaĵoj, preĝejoj.

Post la konstruado de unu el tiuj preĝejoj, de la arkitekto oni krevis la okulojn por ke li ne plu povu realigi tielan ĉefverkon!...

Alia belega preĝejo estis tute detruita en 1926 kaj anstataŭigita de naĝejo... Kiun anstataŭis denova preĝejo en la jaro 1966!...

Sed la caro Petro la 1-a – la Granda – malŝatis Moskvon, kie oni provis murdi lin.

Li volis ĉefurbon kun aliro al la maro. Li ordonis la konstruadon de fortikaĵo "Petro kaj Paŭlo" apud la rivero *Neva* kaj la Balta Maro. Tiel povis kreski la

nova ĉefurbo. Ĝi ricevis la nomon Sankt-Peterburgo laŭ ĝermanlingva deveno. Tiun nomon la urbo konservis ĝis 1914. Poste ĝi fariĝis Petrogrado de 1914 ĝis 1924. Kaj Leningrado de 1924 ĝis 1991.

Ĝi restis ĉefurbo de la Rusa Imperio ĝis 1918, kiam **LENIN** revenis en Moskvon, kaj kiam Moskvo estis denove ĉefurbo de Sovetunio.

Mikaelo montras kaj komentas belajn fotoĵojn: Muzeo Ermitejo (eksa reĝa palaco); du "rostraj" kolonoj kun supraj torĉoj; multaj pontoj; egiptaj aĵoj; ŝipoj sur la rivero Neva; ktp.

Li emfazas pri la "Blankaj Noktoj", dum Junio, kiam la suno brilas tuttage escepte de nur du horoj.

### Mikaelo rakontas du historiajn faktojn malbone konatajn

En Leningrado. Estas statuo de **LENIN**, kun dekstra brako streĉe montranta (sendube) la celon al la komunismo kaj al la proleta liberiĝo. Dum la dua mondmilito germana obuso frakasis tiun brakon. Post la milito nova brako estis skulptita kaj refiksita sur la statuon.

Kiam oni senvualigis la renovigitan statuon, ekiĝis ridego el la ĉeestanta popolamaso... Fakte la artisto skulptis ĉapon en la dekstra mano...

Forgesinte, ke la statuo jam havas

sian ĉapon en la poŝo!!...

En Moskvo, en 1941, dum la sieĝo de la urbo far la germana armeo, ĉiuj oficialaj oficejoj estis vakigitaj.

Tamen en Novembro estis organizita la tradicia parado memore al la revolucio de 1917. **STALIN** ĉeestis tiun manifestacion, montrante, ke li restas kun siaj Moskvanoj.

Ĉeestis, kaj paradis, ankaŭ la militveturiloj kaj la soldatoj. Por doni la impreson de multnombro, la parado de motorigitaj kaj piedirantaj soldatoj plurfoje delasis la placon kaj revenis. Ili fine, plurfoje paradinte, foriris tuj al la batalo kaj al ebla morto sur la proksiman militfronton...

### Sekvis pluraj kantoj de Mikaelo kun lia gitaro

Denove dankon al nia samideano Mikaelo.

Al niaj grupanoj, kiuj ebligis ties venon kaj restadon en *Lille*. Al ĉiuj niaj samideanoj, kiuj venis aŭskulti kaj spekti la programon... Ili certe ne bedaŭras sian venon; kiel atestas iliaj aplaŭdoj salutintaj la oratoron-kanzoniston.

Raportis kaj komentis

*Claude LONGUE-ÉPÉE, Katja BOEN, Michel DECHY*

## El Lille-Villeneuve-Esperanto > METROPOLO

### Vesperaj ludoj en Lille

Depost Novembro 2012 kune ludas ĉiumonate ĉirkaŭ dek Nordaj esperantistoj en la dua etaĝo de la kooperativa kafejo "Le Café Citoyen" en *Lille*, vespere.

Kial ili ludas? Kiel ili elektis siajn ludojn? Ni provos respondi al tiuj demandoj ĉi-sube.

La unuan ideon pri tiuj ludoj havis duo da *Lille*-anoj: *Caroline HUYARD* kaj *Laurent ZIBELL*, kiuj estas la aŭtoroj de tiu artikolo.

Ni kun granda plezuro partoprenis en la kurso por komencantoj organizita de la asocio "Lille-Villeneuve-Espéranto" kaj gvidata de

*Katja BOEN* dum la lerneja jaro 2007–2008.

Ni poste transloĝiĝis en Germanion kaj revenis en *Lille*-on en 2012.

Dum la tempo trapasita eksterlande, ni cerbumis pri la maniero daŭrigi la lernadon de Esperanto post la unua jaro.

La vero estas, ke oni tiucele principe kaj ĉefe bezonas praktiki la lingvon. Sed kiel fari?

Germanio estas la lando de la ludoj. Ne de elektronikaj ludoj per komputilo aŭ poŝtelefono, dum kiuj unusola homo sidas antaŭ sia ekrano. Sed de ludoj ĉirkaŭ familia aŭ amikara tablo,

per kartoĵoj, ĵetonoj, ktp.

Eble oni povus kredi, ke la Germanoj nur ripetas malnovan tradicion, sed oni ne pravus. Ĉiujare oni tie eldonas novajn ludojn, kun novaj reguloj, surbaze de novaj ideoj. Iu nacia jara premio rekompencas la plej bonan ludon, kiu estas tre vaste diskonigata. Fakvendistoj proponas multegon da ideoj por ĉiu aĝo, infanoj, adoleskantoj kaj plenkreskuloj.

Ni pensis, ke oni povus uzi tiun kreaĵon povon por la lingva praktiko, sed ne ekzakte sciis kiel fari.

Reveninte en *Lille*, ni rigardis la retan katalogon de belga fakvendisto de

**ludoj:** "Casse-noisettes" (Esperante "avelrompilo"). Belgio kuŝas geografie kaj kulture inter Germanio kaj Francio. Ankaŭ tio taŭgas por ludoj. La fakvendisto tradukis en la francan lingvon kaj eldonis multajn ludojn el la tuta mondo: el Germanio, la ĉeflando por tiu fako, kaj ankaŭ ekzemple el Kanado.

En multego da strategiaj aŭ lertecaj ludoj ekzistas iuj por instigi homojn al interparolado. Ne kun lingvolerna intenco, sed simple por interkonatiĝi; ĉefe dum festoj kun multaj homoj, normale en la gepatra lingvo. La intenco de tiuj ludoj estas simple faciligi la komencon de interparolado, trovi simplajn kaj amuzajn temojn, pri kiuj ĉiuj povas ion diri. Ni elektis du el tiuj ludoj, kun tre malsamaj ecoj, kaj proponis ilin al la grupo de Lille-aj esperantistoj.

La unua ludo devenas el Germanio, kaj nomiĝas "Saga". La celo estas, ke ĉiuj ludantoj kune kreu unu rakonton pere de desegnitaj kartoj. Ĉiu ludanto elektas laŭvice novan karton, rigardas kaj vidigas ĝin al la aliaj. Li/Ŝi daŭrigas la rakonton ekde la momento, kiam la antaŭa ludanto finis, uzante la karton por ricevi ideojn.

Neniu venkas aŭ perdas: la rekompenco estas la plezuro inventi novan rakonton. Tiu ludo multe laborigas la imagpovon, en la magia mondo de la fabeloj, kun reĝoj, kavaliroj, malproksimaj reĝidinoj, parolantaj ranoj, malhelaj arbaroj...

Sed aliflanke, tiu ludo ne ebligas, ke la rakontanto parolos pri si mem.

La dua ludo venas el Kanado, kaj ĝi nomiĝas "Brin de jasette". "Jasette" estas kanada vorto signifanta "babilado".

Tiel oni hazarde elektas nur unu karton, kiu validas por ĉiuj. Sur la karto estas skribitaj kvar demandoj pri la persona vivo aŭ la persona opinio. La ludanto kiu prenis la karton elektas unu demandon inter la kvar, kiun li/ŝi kredas la plej interesa. Li/Ŝi tradukas ĝin de la franca en la Esperantan lingvon, kaj anoncas ĝin. Aŭskultinte la demandon, ĉiuj ludantoj laŭvice respondas.

La kartoj kaj iliaj demandoj apartenas al kvar specoj: la unua enhavas nur tre ĝeneralajn demandojn, kiel "Laŭ kiaj kondiĉoj vi revus loĝi?"; sed la sekvantaj enhavas pli personajn demandojn, kiuj eĉ povas esti maldiskretaj pri la intima vivo; ekzemple "En kiu malintima loko vi jam amoris?".

Kompreneble, ni antaŭe elektas kiun specon ni uzos. Ĝis nun, ni uzis nur la unuan specon kun ĝeneralaj demandoj. Ĝi tute sufiĉas, por gajiĝi kaj pli bone interkonatiĝi. Ekzemple, ni tre miris pri la diversaj respondoj al la demando: "Ĉu vi ŝatas vian antaŭnomon?". Ĝi naskis rakontojn pri la personeco, kiujn ni ne atendis. Oni multe lernas pri la aliaj partoprenantoj, pri iliaj kaŝitaj aŭ nekonataj spertoj, pri gravaj aŭ malgravaj okazaĵoj, pri neatenditaĵoj... Kaj kelkfoje pri si mem! Tiu ludo

ekzercas la eblecon amuze paroli pri si mem, interesi la aliajn pri siaj spertoj, siaj opinioj aŭ sia humoro. Aliflanke ĝi ne petas grandegan imagpovon.

La du ludoj estas malmultekostaj, kaj oni facile povas aĉeti ilin perrete, ekzemple en la retejo de "Casse-noisettes" (<http://www.casse-noisettes.be>) aŭ ankaŭ en la fakvendejo "Rocamboles" en Lille. La ĵusa foiro "LudiNord" en Mons-en-Barœul, kiu kunvenigis pli ol 2000 partoprenantojn, elmontras, ke tiuj ludoj, eĉ en Francio, komencas trovi sukceson.

En la du okazoj ni opinias, ke tre gravas ludi kaj lasi paroli ĉiun laŭvice. En grupo, kie oni renkontas tre malsamajn nivelojn de lingva sperto kaj de lingva kono, la komuna celo estas pligrandigi la praktikon de ĉiuj. Se ĉiu povus paroli kiam li/ŝi dezirus, nur la plej spertaj povus sin esprimi. Se ni deziras, ke eĉ la plej sinĝenemaj kaj senspertaj partoprenantoj povu kreskigi sian praktikon, ni devas doni al ĉiu la spacon kaj la tempon por tio.

Ni esperas, ke ni ĉi-tie donis al vi novajn kaj amuzajn ideojn, por ekzerci kaj varii vian lingvan praktikon dum interesaj renkontiĝoj en la kutima kunvenejo de via klubo; aŭ en etoso de iu kafejo.

Verkis **Caroline HUYARD**  
kaj **Laurent ZIBELL**

## El Valencieno

# Nova ZEO\* en la Nordfrancia departemento

\*Zamenhof-Esperanto-Objektoj

Komence de 2008, en la kadro de la renovigo de la kvartalo "Château Mallet", en Beuvrages (apud Valenciennes), la municipa konsilantaro kunvenis, por antaŭdecidi la nomojn de kvar novaj vojoj, kiuj estu kreataj por ligi la estontajn loĝejojn de la renovigota rezidejo.

Jean DIETRICH, prezidanto de

Valenciennes-Espéranto, kiu bone konas la urbestron, sugestis al ĉi-tiu, ke estus bone, se unu el la estontaj vojoj nomiĝus "Strato ZAMENHOF" aŭ "Strato ESPERANTO".

Fine de Junio, Jean DIETRICH, Xavier DEWIDEHEM, kiu tiam loĝis en Beuvrages, kaj Jean-Marc FRATARD

renkontiĝis kun la urbestro de Beuvrages, por debati kaj argumenti pri la propono nomi iun straton "ZAMENHOF" aŭ "ESPERANTO".

La 18-an de Februaro 2009, la municipa konsilantaro decidis pri la nomoj atribuitaj al la novaj stratoj; kaj unuanime estis deciditaj la kvar

nomoj proponitaj, inter ili estas la "Strato Ludwick L. ZAMENHOF".

Sabaton la 20-an de Aprilo 2013 okazis la inaŭguro de la stratoj. Sub sunplena, blua ĉielo, sed kun freŝa vento, pli ol cento da personoj trairis la novan, belan kvartalon por inaŭguri la kvar stratojn.

Tri stratoj estis dediĉitaj al personoj de *Beuvrages* kiuj siatempe agadis por la komunumo, aŭ por lokaj socialaj organizaĵoj, aŭ kiuj aktive partoprenis en la rezistado dum la dua mondmilito... Temas pri *Jean CHARAT*, *Julien DHERBOME*, *Jean DIME*.

Antaŭ la senvualigo de ĉiu stratŝildo, la urbestro *André LENQUETTE* prezentis la agadojn faritajn de la koncernato, en ĉeesto de liaj familianoj. Sekvis senvualigo kaj varmaj aplaŭdoj. La kvara senvualigo koncernis la straton "Ludwick L. ZAMENHOF"; tiam la municipa muzikistaro ludis francan marŝmuzikon kaj la urbestro prezentis al la ĉeestantaro ZAMENHOF-on kaj lian idealon de paco konkretigitan per la internacia lingvo Esperanto. Poste *Jean DIETRICH* dankegis la urbestron kaj legis la mesaĝon, kiu estis sendita de *Louis Christophe ZALESKI-ZAMENHOF*, la nepo de Ludoviko ZAMENHOF.

"Monsieur le Maire, Messieurs et Mesdames les Conseillers Municipaux,

Je viens d'apprendre que vous avez décidé de donner le nom de ZAMENHOF à une des rues de votre ville.

Étant moi-même le petit-fils ZAMENHOF, j'en suis touché, comme toujours dans des circonstances pareilles. Et je vous félicite de votre décision, grâce à laquelle la ville de *Beuvrages* va entrer dans la famille des villes, grandes et petites, dont des centaines sont disséminées à travers notre monde, villes dans lesquelles une rue, une place ou un square porte ce même nom.

Espérons, que les hommes et les femmes qui traverseront la rue ZAMENHOF de votre ville de *Beuvrages*, ainsi comme dans toute autre ville, auront une pensée pour des idées qui étaient celles de l'auteur de la langue internationale: de la fraternité des hommes de toutes les couleurs, de toutes les nationalités, bien que représentant des idéologies, voire des religions distinctes.

Qu'ils forment tous une grande famille, chantée dans l'hymne des Espérantistes.

Veuillez recevoir, Monsieur le Maire, l'expression de mes hommages respectueux.

*Louis Christophe ZALESKI-ZAMENHOF*".


Tiam la municipa muzikistaro solene ludis "La Esperon". Sekvis varmaj aplaŭdoj. Ĉeestis multaj Nordfrancaj esperantistoj el *Lille*, *Araso*, *Valencieno*, kaj belgaj esperantistoj el *Solre-sur-Sambre*, *Charleroi* kaj *Gento*. Post tiu ceremonio, ĉiuj estis invititaj trinki honorvinon en pli varma loko: la lerneja restoracio *Alexandre BOUDAÏT*. Tie la urbestro *André LENQUETTE* denove prenis la parolon, por kompletigi tion, kion li diris dum la inaŭguro de la stratoj. *Jean DIETRICH*, *Xavier DEWIDEHEM* kaj *Arlette PLUTNIAK* diris kelkajn vortojn respektive nome de *Valenciennes-Espéranto*, de *Espéranto-France* kaj de la Nordfranca Federacio.

Tridekoj da esperantistoj kune manĝis en restoracio en la apuda vilaĝo *Bellaing*.

Verkis *Jean DIETRICH*


## El Valencieno

# Agad-raporto el Valencieno por 2012

 De kelkaj jaroj, nia grupo maldikiĝadas pro la forpaso de fidelaj membroj kaj pro la ne alveno de novaliĝantoj. Lastjare nia grupo havis 15 membrojn, kiuj estas ankaŭ membroj de la Norda Federacio.

Ni organizis kursojn en la Domo de Asocioj de Valencieno:

- 1a grado: ĉiun jaŭdon je la 10a ĝis la 12a kun 3 gelernantoj, gvidanto *Jean MACKÉ*.
- 2a grado: ĉiun sabaton je la 10a ĝis la 12a kun 4 gelernantoj, gvidanto *Jean DIETRICH*.

 Kelkaj membroj partoprenis en okazaĵoj:

- La 9an de Januaro, *Jean DIETRICH* kaj *Daniel KMIĘCIK* ĉeestis en la prelego de *Mikhaïl BRONSTEIN*, kiu okazis en *Lille*.
- La 15-an de Aprilo, *Jean DIETRICH*, *Jean MACKÉ* kaj *Lucie MAZURKIEWICZ* partoprenis en la Nordfederacia Kongreso en *Wavrans-sur-Ternoise*.
- La 23an de Junio okazis la 36a jara renkontiĝo de la grupoj *Valenciennes* kaj *Solre-sur-Sambre*. Ni estis 22 geamikoj el *Solre-sur-Sambre*, *Trélon*, *Mons* kaj *Valenciennes*. Ni pasigis

agrablan momenton en la restoracio "Les Verger Tellier" en *Le Quesnoy*.

- La 17an kaj 18an de Novembro, *Jean DIETRICH* partoprenis en la **24a Eŭropa Rendevuo** de "Stella Maris".

 Post longdaŭra agado de *Jean DIETRICH*, finfine okazos la inaŭguro de strato "Ludwick L. ZAMENHOF" en *Beuvrages* la 20an de Aprilo 2013.

Verkis *Jean DIETRICH*


## Vivo de Valencienano : Pierre-Joseph FONTAINE

Kvankam li naskiĝis en *Bruay-sur-Escaut*, la 19an de Decembro 1810, li estis adoptita de la karbomineja loĝantaro de *Anzin*.

Tute juna li akompanis sian patron al la laboro, al la Ŝakto de la Marĉo (*Fosse du Marais*), kie li distingiĝis farante multajn, afablajn kaj sindonemajn agojn. Post iu akcidento, li devis restadi kuŝanta en lito dum tri jaroj. Li profitis de tiu necesigita neaktiveco por kleriĝi, kaj kiam li povis la laboron rekomenci, konservante pro sia akcidento iun lamadon, li estis nomumita metiejestro de la priligna laborejo en la Anzina Konstruejo. Malgraŭ sia handikapo, li estis ankoraŭ estimata pro sia sindonemo kaj sia kuraĝo. Post iu incendio, dum kiu li distingiĝis, arĝenta medalo estis al li donacita de la Kompanio.

*Pierre-Joseph FONTAINE*, konsciante pri la danĝeroj de la minejo kaj pri ĝiaj multaj akcidentoj, strebis plibonigi la sekurecon. Unu el la kialoj de la akcidentoj, maloftaj sed mortigaj, estis la rompiĝo de la kabloj tenantaj la ŝaktajn kaĝojn. Tiuj kaĝoj estis gvidataj de vertikalaj lignaj reloj, la gvidiloj. *FONTAINE* inventis en 1845 aparaton evitigantan la falon post rompiĝo de la kablo. Helic-risorto, streĉite de la kabla streĉo, ekmovas, okaze de rompiĝo de la kablo, metal-

ajn brakojn, kiuj, penetrante en la gvidilojn, bremsas kaj haltigas la falon.



Pri tiu invento, oni rakontas la jenan anekdoton: "*FONTAINE*, volante elmontri la efikecon de sia aparato, muntigis, dum ĉeesto de la administracia konsilio kaj dum samtempa ĉeesto de *THIERS*, skafaldon kie povis moviĝi minĉaro ekipita de lia paraŝuto. Pendigite per kablo ĉe la supro de la skafaldo, la minĉaro estis ellasita, *FONTAINE* sin lokis suben kaj lastmomente li ekfunkciigis la mekanismon. La halto estis tuja, kaj ĉiuj skeptikuloj estis entuziasmitaj."

De 1851 ĝis 1859, en la dekkvar min-ejoj de la Anzina Kompanio ekipitaj de la *FONTAINE*-a paraŝuto, okazis deknaŭ eventoj de kabla rompiĝo, sed la aparato perfekte funkciis kaj cent kvindek laboristoj havis la vivon savitan.

La sistemo estis patentita en Francio, Belgio, Germanio.

*FONTAINE* ricevis premion de la Akademio de la Sciencoj en 1854 kaj Oran Medalon okaze de la Universala Ekspozicio de 1855. La Kruco de la Honora Legio estis al li aljuĝita en 1860.

Li mortis la 15an de Junio 1877 en *Anzin*.

La 3an de Julio 1893, antaŭ la ĉeesto de ĉiuj ministoj, oni inaŭguris en *Anzin* monumenton reprezentantan ministon dankantan *FONTAINE*. Tiu monumento, kiel aliaj, estis mal-konstruita de la germanoj. La skizo feliĉe estis savita, kaj estas videbla en la muzeo de la Minejoj. Liaj aŭtoroj estas du Anzinanoj, *Constant MOYAUX* kaj *Corneille THEUNISSEN*.

Eltiraĵo de la libro de S-ro Jean-Claude *MOUYS*:  
**"HISTOIRE D'ANZIN"**  
 Tradukis Jean *DIETRICH*

### Fédération Espéranto-Nord

## Evoluo de la listo de la membraro

	2006	2007	2008	2009	2010	2011	2012	2013
Arras-Espéranto	30	28	28	23	24	25	23	21
Boulogne-Espéranto	9	5	4	0	4	0	0	4
Dunkerque-Espéranto	35	31	28	19	19	22	15	13
Lille-Villeneuve-Espéranto	44	33	33	32	31	21	24	23
Valenciennes-Espéranto	29	29	22	25	24	15	15	16
Somme-Espéranto (Espéranto 80)	0	0	0	0	0	0	22	18
Isolé(e)s	23	22	11	20	16	16	19	8
<b>TOTAL</b>	<b>170</b>	<b>148</b>	<b>126</b>	<b>119</b>	<b>118</b>	<b>99</b>	<b>118</b>	<b>103</b>

## Granda vojaĝo

# Raporto pri Brazilo (unua parto)

Dum Esperanta staĝo, kiu okazis en Grezijono, en Francio, mi konatiĝis kun Franciska. Ŝi alvenis el Brazilo.

Ni eksimpatis unu la alian, ni ekamik-iĝis kaj ni perrete ekkorespondis.

En la pasinta jaro, ŝi venis en Francion kaj vizitis min en mia hejmo. Mi vizitigis al ŝi Amieno kaj la golfeton de la rivero *Somme*.

Dum sia restado, pere de mi ŝi renkontis kelkajn geesperantistojn kaj kelkiujn aliajn el miaj geamikoj.

Franciska invitis nin en sian landon. Do, nia grupo de kvin geamikoj: tri esperantistoj kaj du neesperantistoj (*Thérèse-Marie, Jean-Marie, Gérard, Jeanine* kaj mi) organizis vojaĝon al Brazilo. Franciska gastigis nin en sia domo en San-Paŭlo.

Jen la raporto pri nia restado en Brazilo.

Verkis *Bernadette MANIER*  
kaj *Thérèse-Marie FRENOY*



### San-Paŭlo

Franciska atendis nin en la flughaveno de San-Paŭlo.

Dum kvar tagoj, ŝi prizorgis nin en sia domo.

Parolante en Esperanto, ŝi konatigis al ni diversajn kutimojn, vivmodojn,

ĉiutagaĵojn. (komunikado, mono...). Franciska kuiris por ni multajn specialaĵojn de sia lando. Pere de ŝi ni gustumis fruktojn, sukeraĵojn, ni vizitis ŝian tiom grandegan urbon.

La katedralo kunigas multajn stilojn (gotika, baroka, Romana, Bizanca kaj moderna). Ŝajnas, ke neniu el tiuj stiloj estas forgesita.

Sur la placo de la katedralo, multaj monumentoj rememorigas pri la sklava periodo.

Supre de tre alta konstruaĵo, Franciska malkovrigis al ni tiujn gigantajn multetaĝajn konstruaĵojn (*buildings*), kiuj etendiĝas sur pluraj dekoj da kilometroj. Impona panoramo!



## ENHAVO

### NIAJ MEMBROJ VERKANTAS

- ★ Raporto pri Brazilo (1-a parto) p15
- ★ La telerbretaro (1-a parto) p17
- ★ 9-a Eŭropa Esperanto-kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio p19
- ★ La plej belaj okazaĵoj pri birdoj (2-a parto) p21
- ★ Mallongaĵoj p22
- ★ Atentigo de la redaktoro p24

Sur la tegmentoj de la "*buildings*" estas naĝejoj, malgrandaj domoj kaj lokoj, kie surtegmentiĝas helikopteroj.

Ni promenadis en grandega parko. En ĝi etendiĝas bela lago, kreskas eksterordinaraj arboj. Multaj pavilonoj akceptas diversajn imponajn eventojn.

Tiu parko estas unu el la pulmoj de tiu urbo, en kiu la trafiko estas intensa kaj malfacila. Ne ĉiuj veturiloj povas kune libere cirkuli. Laŭ la horoj, vi jes aŭ ne rajtas cirkuli: dependas de la numero de via licenĉplato.

Per buso kaj metroo, Franciska akompanis nin al speciala evento: la festo de la "Gaŭĉoj". Tio estas tradicia festo de la antaŭaj kampanaroj de la sudo de Brazilo, kiuj estis venintaj al San-Paŭlo por labori en urbo.

Ili estas nostalgiaj pri sia antaŭa vivo kaj daŭrigas siajn kutimojn, organizante du fojojn ĉiumonate tiujn laŭkostumajn festojn por danci kaj



manĝi bongustan rostitan bovinajon.

Alian faman kaj gravan aferon Franciska malkovrigis al ni: kvartalan sambo-lernejon.

Antaŭ la karnavalo, kiu okazas en Februaro, la diversaj sambo-lernejoj estas notitaj.

En la momento de nia restado, en Oktobro, okazis ampleksa ripeto por prepari tiun elekton. La bruoj estis infereca, eĉ kun orelŝtopiloj.

Franciska insistis, por ke ni estu fotitaj kun la "belaj dancistinoj", kun la flago kaj la muzikistoj.

### Foz de Iguaçu

Per aviadilo, ni iris al *Foz de Iguaçu*, en la okcidenta sudo de Brazilo.

Ni estis gastigitaj dum du tagoj de Manoelo, esperantisto konata de Franciska. Li estas episkopo de speciala kristana eklezio.

Nur unu tagon ni havis je nia dispono por viziti la famajn akvofalojn kaj la parkon de la birdoj.

Manoelo bone klarigis la vojiron kaj faciligis niajn vizitojn.



La akvofaloj situas sur la limo inter Argentino kaj Brazilo. Ili falas en gigantan kaj profundan cirkon. De tie, kie ni staris, ni vidis la Argentinajn akvofalojn kaj ni divenis la malproksimajn Argentinanojn, kiuj regardis al Brazilaj akvofaloj.

Ni eltrovis multajn akvofalojn, kiuj alvenas kaj falas laŭlonge de pluraj kilometroj. Laŭ signalizita promenejo, ni alproksimiĝis al la akvofaloj, alvenante tre proksimen al unu

el ili. Tie, la spektaklo estas apoteozo. Speciala konstruita vojo ebligas piediri laŭlonge de la akvofalo ĝis loko, kie tiu ĉi denove falas en profundan krutajon. La akvo fortege bruegas. La nebuloj malsekigis nin. Ni sentis nin tre malgrandaj meze de tiu forta kaj impona naturo. Estis belege kaj grandioze!

### Belem



Per aviadilo, ni transflugis Brazilon ĝis ties norda parto, je 4000 km de *Foz de Iguaçu*.

Kiam ni alvenis grandan ŝokon ni sentis: estis la varmego! *Belem* situas ja proksime al ekvatoro.

Feliĉe, atendis nin tre komforta "pousada" (malgranda hotelo).

La urbo multe kreskis kaj ĝi estas miksaĵo de malgrandaj kolorriĉaj domoj kaj de plur-etaĝaj konstruaĵoj (buildings).

La loĝantoj en tiu regiono estas pli nigrecaj kaj pli maldikaj ol en la aliaj partoj de Brazilo.

Niaj vagadoj tra la urbo alvenigis nin ĝis granda kovrita bazono: bela blua fera konstruaĵo.

En ĝi troviĝas: grava diverseco de freŝaj, salumitaj kaj sekigitaj fiŝoj, de ŝelbestoj, de multaj specioj de salikokoj, de fumumitaj viandoj, de freŝaj legomoj kaj fruktoj; kaj ankaŭ de manfaritaj objektoj, ĉefe ceramikaĵoj de *Belem de Pará*. Tiujn ceramikaĵojn (bruna tero kun geometriaj desegnoj) ni retrovis ĉie en Brazilo.

Proksime, estas la malgranda haveno. Sur lito de rubaĵoj, la fiŝboatoj atendas. Tiu loko tre malbone odoras.

De tie, ni atingas la maron, laŭirante la antikvajn fortikaĵojn.

Aliloke estas la antaŭaj staploj, kie okazis la komerco de kaŭĉuko.

Kaŭĉuko konsistigis la grandegan riĉecon de Belem ĝis la momento, kiam estis mona devaluto, kaj tiam la komerco iĝis ne interesa.

En Indonezio, oni sukcese faris kaŭĉukon el heveoj, kaj Brazilo perdis tiun komercon.


Nun, tiuj staploj iĝis granda moderna komerco-centro.

Tie oni povas gustumi la famajn glaciaĵojn "CARIU". En tiu vendejo oni povas gustumi kvindek diversgustajn glaciaĵojn. Tial ke ni ne komprenis la portugalan, ni ilin elektis laŭ ties aspektoj kaj ni ne sciis, kion ni manĝis. La gustoj estis sufiĉe strangaj.

Dum unu tuta tago, per boato, ni eniris en la Amazonian arbaron, sur la rivero *Guama*, kiu estas alfluanto de la rivero Amazono.

Ambaŭflanke de la rivero estis palafitoj: tio estas lignaj domoj sur akvo, kie vivas indiĝenoj.

Laŭlonge de la rivero, ni admiris la vivoplenan diversecon de plantoj, arboj kaj mangrovoj de la ekvatora arbaro.



La gvidisto estis tre interesa, afabla kaj amuza viro, kiu klarigis al ni multon pri la arboj, fruktoj kaj bestoj. Li venigis nin ĝis la domo de maljuna Indiano en malgranda vilaĝo.

Tiu Indiano elmontris al ni teknikon por surgrimpi la arbo-trunkojn. Per granda palmfolio, li plektas duoblan ringon, en kiun li enmetas siajn nudajn piedojn. Per la forto de siaj brakoj, helpite de la apogo de la ringo, li tre rapide grimpas.



Kompreneble li proponis, ke nia grupo provu. Ni multe ridis kaj nur unu el la grupo sukcesis grimpi unu metron, ĉar la afero necesigas forton, lertecon kaj trejnadon.

Kiam ni estis denove sur la rivero por reveni, estis strange troviĝi en tiu primitiva arbaro de alia tempo kaj, samtempe, malkovri la grandan urbon *Belem* kun ĝiaj pluretaĝaj konstruaĵoj: du tre malsimilaj sed tre proksimaj mondoj.

### La Insulo Algodoal

Post unuhora boatado, ni alvenis en la belan insulon *Algodoal*.

Tre trankvila loko sen veturilo, nur ĉevalveturiloj por transporti nin ĝis

komforta "pousada".

La vetero estis varma. Ni promenadis, ni naĝis. Bedaŭrinde, la suno brulis la piedojn de *Gérard*, kiu dum tri tagoj ne plu povis marŝi.

*Bernadette* perdis siajn okulvitrojn.



Certe, kiel kutime, ŝi lasis ilin sur la kapo, dum ŝi banis sin, kaj la akvo

forportis ilin. La morgaŭon, ni reiris sur la strandon por serĉi ilin. Ni ne retrovis ilin sed ni trovis aliajn (bone por *Thérèse-Marie*, kiu tiel trovis sunokulvitrojn por anstataŭigi tiujn de ŝi perditajn). Ni multe fotis tiun lokon ĉar la maro, la ĉielo, la lumo kaj la koloroj estis belegaj!

Fino de la unua parto (daŭrigota en la venonta numero)...

Verkis *Bernadette MANIER*  
kaj *Thérèse-Marie FRENOY*

Ilustraĵoj: el la reto.

## Originale franclingva novelo verkita de *Lydie BOUVELLE*

### La telerbretaro (unua parto)

#### Ĉapitro 1-a: LA FALO

La sceno vere meritis la ekrigardon. Ĉiuj tri staris antaŭ la telerbretaro, kiu ĵus sterniĝis, rompante en la sama elano la telerojn, pladojn kaj glasojn, kiujn ĝi entenis kaj kiuj ĵus estis bonorde kaj metode ordigitaj laŭ la prudentaj instrukcioj de la familia laborestro.

*Sam*, la filo, granda adoleskanto, kun haroj sur la mentono kaj voĉoŝanĝo. Li estis rekviziita por partopreni "bonhumore, ni petas, se ne, tio ne valoras" en la starigado kaj plenigado de la telerbretaro.

*Sam* estas rideganta. Li povas. Li sentas sin ne koncernata. La meblo kaj la teleraro ne apartenas al li, ĉiaokaze ne senpere kaj ĉiumaniere ne tuje. *Sam* trovas tiun katastrofon ege amuza. Se estus lia komputila terminalo aŭ lia skotero, kiu estus en tia stato, li ne ridus. Sed, en la nuna cirkonstanco, estas disponebla lia ne difektita humuro, kiu ebligas al li taksii la groteskecon de la situacio, kaj li de tio ne sindetenas.

Kia rekompenco ne atendita, ne esperita. Dio estas granda. Dio estas bona. La tuta posttagmezo, dum kiu li estis enfermata en tiu kuirejo kun siaj gepatroj, sin okupante kun ili pri

trudita aktiveco, estas plibonigata, valorigata danke al tiu momento – ni ne estu etanimaj – ĝojegiga.

Paŭlo, la patro kaj la edzo, titulara memfaranto en la hejmo.

Li estas ŝokiĝinta. Li incitiĝas. La kolerego en li disputas kun la frustrigo kaj, pli inside, kun la ofendiĝo.

Kiel tio eblas? Li scias, ke li taŭge muntis la telerbretaron, kaj plie ke ĝi multekostis. La uzindikoj estas ĉiam nekompletaj kaj nekompreneblaj. La pruvo: tiu ligna stango, kiu restas neuzita; ĝi trois.

Li aŭdas la ridon de *Sam* kaj sin turnas al li por silentigi lin, sed li estas ankoraŭ senspira. El tiu meblo li faros lignosplitetojn. Kaj tiel, krom esti mallerta, Paŭlo estiĝas malprudenta, atinginte la limon al la ridindeco. Li igas respondeca objekton sen animo, sen la plej malgranda unco da volo aŭ da sensitiveco. Tamen, la telerbretaro iĝas ricevanta malamon, al kiu neniam estos donita respondo. Se li maltimus, Paŭlo frapus ĝin.

Paŭlino, la patrino kaj la edzino, delikata kaj en beleco.

Ankaŭ ŝi estas ekstreme ŝokita. Ŝi ĝemas tordante siajn manojn. Ŝi elektis por si la tendaron de la interna seismo. Ŝia tuta vazaro estas dis-

rompita; ankaŭ la kristalvazaro, donacita okaze de ŝia edziniĝo, kaj kiun ĝis nun ŝi sukcesis ŝirmi, transirigante ĝin el la provo de la familiaj manĝoj kaj de la translokigoj. Ŝi do elektas la dramon kaj ties elmontrojn, ĉar la lokoj de la kolero kaj de la ridado estas jam okupitaj. Kaj, kiel patrino kaj edzino, ŝi sin devigas al la sinofero. Ŝi ne aŭdacas iri ĝis la racieco, kiu alportus al ŝi la pacon kaj ŝirmus ŝian ŝminkon. "Ĉio ĉi ne tre gravas, estas nur iom da teleraro; ties anstataŭigo memkompreneble havos avantaĝon".

Ne, estas tro frue, li ne komprenus, ke ŝi atingas tian serenecon, dum li antaŭe ne estus ŝin konsolinta kaj resereniginta. Paŭlino ploras.

Post la paso de la miregiga momento, la ĉefroluloj de tiu mebla fuŝado ekmoviĝas kaj esprimas – ĉiu laŭ la sento sin animanta – dirojn ĉi-foje klare artikulaciitajn. Ĉiuj sammomente parolas. Tiam la problemo ne estas, ke oni interŝanĝu siajn respektivajn impresojn, kaj diru kiel trovi – per la efiko de la interkomunikantaj vazoj – iun komunan humoron. Oni nur elverŝu sian sakon da emocioj, tute neatentante la emociojn de la aliaj. Banale, kutime? Ĉiaokaze evidente prikonsentite,

almenaŭ tial ke tio longa-tempe daŭrantas, anstataŭigante per kakofonio la silenton ricevitan danke al la teleraro.

*Sam*, malpli koncernate, do pli klarvide, anticipas la batalon, kiu anonciĝas kaj por kiu li estos mobilizita. Li forlasas la kuirejon, celante sian dormoĉambron. Konsidere la ĥaason, eblas ke liaj gepatroj forgesos lin, se li malaperas el ilia vidtereno.

Paŭlo ĉesigas sian kriadon kaj sin turnas al Paŭlino, kiu ankoraŭ singultas. Lia unua frazo "Sed ĉesigu la ploradon!" similas al incitiva admono, kiun oni servas al tro emociebla infano.

Vigle pikite, Paŭlino forgesas sian tragediecan tekston kaj instigas Paŭlon ne paroli al ŝi tiatone; kaj helpi ŝin ripari la damaĝon – subkomprenige laŭ la tonnuanco de la diraĵo –, kiun li okazigis.

Kun nekomunikema vizaĝo, drapirate en iaspece ofendita digno, ŝi komencas pluki la telererojn, kiujn ŝi metas sur la tablon jam troplenigitan de plastajoj, kartonpecoj kaj iloj. Tio ne tre efikas, sed tio estas maniero ĉesigi malkvietan interŝanĝon, kiun ŝi ne plu deziras daŭrigi. Kio iĝas necese, tio estas la reordigo de la kuirejo kaj la malaperigo de la konsekvencoj de tiu katastrofo. Tiel la vivo revojiros. Ĉiamaniere ŝi ne deziris tiun bretonon.

Iliaj dudek jaroj de geedza vivo ebligas al Paŭlo elekti, post kvarono de sekundo, la diplomatecon. Li ege deziras malmilde respondi al ŝi kaj, ni konfesu tion, sin kvietigi pere de agreso al ŝi. Sed, ĉar li bone scias, ke li verŝajne preteratentis iun etapon dum la muntado, eble kiam Paŭlino rimarkigis tion al li, kun ĉemane la uzindiko, kiun li eltiris de ŝi, buligante ĝin, li ne certas venkinte eliri el la disputo. Li kliniĝas apud ŝi kaj pardonpetas. "Vi pravas" li diras kaj informas al ŝi, ke li serĉos platan keston en la garaĝo.

Tinto de sonorilo subite haltigas lin en lia elano. La pordo malfermiĝas, sen iu ajn esprimo de enirinvito.

"Estas mi!". Paŭlo eldiras, kun-

premante la dentojn: "Mankis nur ŝi!".

Isabela, la pli aĝa ĝemelino de Paŭlino, envenas en la kuirejon. "Sed, kio okazis?". Ŝi tuj bedaŭras esti stariginta, tiel neutile, tiun demandon. Malgraŭ la evidenteco, kiu devintus abortigi ian ajn respondon, Paŭlino kaj Paŭlo ĵetas sin en klarigojn pli malpli koherajn, pli malpli agresemajn. Izabela kaptas informojn pri la malfacilaĵoj renkontitaj por ŝarĝi la meblon en aŭtomobilo kaj pri la fakto, ke estis necese lupreni kamioneton. "Haltu! Sufiĉas! Mi komprenis!".

Kriante, Izabela sukcesis ĉesigi la parolfluegon de Paŭlo kaj Paŭlino. Ili sin rigardas unu la aliajn, Paŭlino kaj Paŭlo estas embarasitaj. Ŝi rekomencas tordi siajn manojn, kun larmoj en la okuloj. Li anaspaŝadas kaj, post kelksekunda hezito, forlasas la kuirejon. Kiam li revenas kun la kesto, li aŭdas Izabelan, kiu, preninte sur sin la aferon, sin proponas helpi ilin pluki la telererojn, por ke ili povu poste, kiel antaŭvidite, butikumi.

Tiel estis farite.

La vasta vakanta spaco, nun situanta sur la antaŭa loko de la telerbretaro, elmontras la plenumitan laboron. Izabela kaj Paŭlino estas foririntaj. *Sam*, dum tiu tuta tempo, restadis en sia ĉambro kvazaŭ ega malsanulo, kaj li ankoraŭ tie troviĝas. Paŭlo, elĉerpita, instaliĝas en la salono kaj ekpleniĝas per biero.

Kia evento pri meblo! Jen de semajnoj tiu telerbretaro estas ilia ĉefa zorgo. Izabela ne malpravas: ili estas ja feliĉaj havi nur tian zorgon!

## Ĉapitro 2-a : LA FUGO

Paŭlino kaj Izabela ege similas unu al la alia. Ili estas ĝemelinoj, kaj tio estas evidenta. Kiam ili estis junaj, kiel ĉiuj ĝemeloj, ili per tio amuziĝis je la damaĝo de la aliaj. Paŭlo estis unu el iliaj viktimoj, tutkomence kiam ili konatiĝis kun li. Tio ĉesis kun li, kaj kun ĉiuj, tuj kiam Paŭlino ekkomprenis, ke ŝi amsopiras al li.

La fianĉiniĝo, la edziniĝo, la nasko de *Sam*, la sinsekvo de tiuj eventoj en la vivo de Paŭlino anoncis la finon de ilia kunkulpeco.

Hodiaŭ, Izabela havas fratinton, kiun ŝi

tenere amas. Ili regas siajn respektivajn vivojn flankĉeflanke, neniam plu povante interŝanĝi eĉ ne dum unu horo.

Ĉiamaniere, supozante ke Paŭlino konsentus sin fordoni al tiu ludo, neniu plu estus trompita, krom iu tute fremda, ĉar ilia vivfilozofio, kaj do ilia personeco, laŭiris malsamajn vojojn.

Izabela estas zorgoplena. Ŝi rigardas la montrofenestrojn, ŝi malatente aŭskultas la komentojn de Paŭlino, kiu serĉas mantelon por la edziniĝa festo – la reedziniĝo – de *Magali*, komuna amikino. Sed ŝi nenion diras. Ilo ronĝas ŝiajn pensojn, kaj ŝi havas pli kaj pli da peno tion kaŝi. Jam de pluraj semajnoj ŝi estis scianta, kaj de tiam ŝi sin demandas kion fari. Kiel kutime ŝi atendas esti trovinta la solvon, por prezenti ĝin samtempe kun la problemo al Paŭlino.

Ŝi neniam ŝatis la konsilojn. Nek ilin doni, nek ilin ricevi. Neniu povas decidi anstataŭ alia persono, neniu povas efektive kompreni ies situacion kaj scii tion, kio taŭgas por ĝi. La naturo de iu homo estas tiom kalejdoskopka, ke ĝi restas, dum la tuta daŭro de ties vivo, mistero por ties samuloj. Oni povas ami, posedi, estri, protekti, kompreni, toleri, fidi, anstataŭi homan estaĵon; sed oni ne povas vere koni ĉi tiun. Oni ne povas klarigi la kompleksecon de ties persona konstruo. Eĉ se oni estas kune edukitaj, eĉ se oni estas ĝemeloj, oni havas pri la alia nur stumpigitan vidmanieron, naskitan de tio, kion la alia faras, de tio, kion la alia konsentas montri.. Neniam oni povos havi pri la alia tiun intiman internan percepton, kiun oni havas pri si mem.

Tial, la konsiloj!... Laŭ la plej bona el ĉiuj hipotezoj, se ĉi tiuj konsiloj estas gvidataj de simpatio, ili povas esti helpo al la decido, lumante per bonkoreco neesploritan kaŝfaldon. Laŭ la plej malbona el ĉiuj hipotezoj, ili estas nur profitserĉaj kaj ili provas protekti nur tiun, kiu ilin donas aŭ firmigi ĉi tiun en ties propraj elektoj. En la plejmulto de la okazoj, ili maltrafas la veran problemon; ĉu pro tio ke la konsildonanto ne montris,

memvole aŭ ne, ilian realecon; ĉu pro tio ke la konsildonanto ne komprenis la parolojn aŭ tradukis ilin tra sia propra prismo kaj ilin devojigis. Perdite en tiuj konsideroj, Izabela mezuras la distancon, kiu hodiaŭ disigas ŝin de Paŭlino. Estas mirige. Kiam ŝi rigardas ŝin, ŝi havas tiagrade la impreson vidi sian propran respegulon en spegulo. Izabela ekkonscias, ke, kio malhelpas ke ŝi konfesos tion, kion ŝi finfine devos konfesi al Paŭlino, tio ne estas la konsiloj, kiujn ŝi donos al ŝi. Ŝi ja jam konas ŝian reagon kaj antaŭtimas ĝin. Ŝi konas ŝian sociecan reagon, oficialan; sed ŝi ne scias tion, kion ŝi travivos, kion ŝi komprenos funde de si mem. Estas tiu distanco, kiu detenas ŝin.

De fremdulo, eĉ de amiko, tio ne ĝenus ŝin. Sed de Paŭlino, ŝi ne certas ĉi-foje povi tion elteni.

Izabela interne sin skuas. Pli poste tion oni vidos. Estas nek la loko ĉi tie, nek la momento ĉi tiam, por tiela pripenso.

Ĉiumaniere Paŭlino altiras ŝin en vendejon. Lastatempe kontemplinte mantelon en la montrofenestro, ŝi decidis surprovi ĝin. Post la ĝentilaĵoj kaj kliniĝadoj kutimaj en tiaspecaj butikoj, Paŭlino surprovas la mantelon, kiu rave taŭgas al ŝi. Ŝi ĝin surprovigas al Izabela por pli bone ĝin taksi; ĝi ankaŭ al ŝi rave taŭgas. Ŝi aĉetas ĝin, kaj ŝi elmontras sian kontentecon per granda rideto. Ŝi

ĝojradias. Ŝi belegas.

Miriga Paŭlino! Antaŭ apenaŭ unu horo ŝi priploris sian telerbretaron, kaj nun ŝi esprimas sentiman feliĉegon. Vere, kian povon ja havas mantelo!

Sed ne! Ne temas pri la mantelo, ŝi ne estas tiom supraĵa. Ŝi trompfriponis antaŭ unu momento. Trompfriponi, ŝi ja bone scias tion fari. Eble la vorto estas iom troiga. Ŝi elturniĝas el la vivo; el la devo kompromisi kun sia edzo, kun sia filo. Nun delonge ŝi difinis sian klanon en si. Ŝi privilegias la vivelekton alprenitan antaŭ dudek jaroj. Por ion fari, ŝi ofertas parton de si mem. Ŝi sin tenas malproksime de iuj el siaj pensoj, el siaj pripensoj, ŝi ŝnurligas siajn proprajn ribelojn, ŝi neglektas kelkajn trajtojn de sia personeco. Tamen nenio ŝanĝiĝis. De plej frua tempo pri kiu ŝi memoras, ŝi restas sama. Simple, el tio ŝi faris absolutan sekreton, eĉ rilate al si mem. La kaŝado ĉesis esti insidema, kiam ĝi estiĝis dua naturo. Tio estas la prezo kiun ŝi pagas, kiun Paŭlo pagu, kiun *Sam* pagu, kiun ĉiuj pagu, por vivi trankvile, kaj finfine feliĉe, kun la deziro al la aliaj.

Ĉar estas interŝanĝo. Tiel ŝi ne dubas, ke ankaŭ Paŭlo rezignis parton de si mem, por sekurigi kaj protekti ilian geedzan feliĉon. Ŝi havas nenian bedaŭron, nenian skrupulon. Kion ŝi privilegias, tio estas sendube parta, sed tio estas ankaŭ ŝi. Kiam ŝi elektas

plori anstataŭ ridi, ŝi ververe ploras. Ŝi povintus ankaŭ ridi, jen finite. Ŝi nur tre rapide komprenis, ke la ekvilibro estas pli facile atingita kaj daŭrigata, se ŝi ploras.

Ŝia teorio estas simpla: ĉiu devas povi ludi rolon, kaj estas des pli bone se la roloj estas bone distribuitaj, kaj respondas al la bildo, kiun ĉiu al si kutime bildigas pri la vivo. Al tio certe mankas honesteco, sed la honesteco suferigas. La fideleco al si mem havas alian flankon, kiun ŝi ne deziras koni: la solecon.

Izabela nomas tion libereco, aŭtonomio. Eble, sed tiu libereco kaj tiu aŭtonomio ne povas embarasiĝi kun iu familio. Kaj la familio, tio estas grandvalora.

Cetere ŝi havas Izabelan, kiu laŭiris alian vojon, kaj kiu ebligas al ŝi ne forgesi tion, kion ŝi kapablintus privivi. Ili tiom similas unu al la alia. Kelkfoje, kiam ŝi rememoras pri la pasinteco, ŝi havas la senton, ke se estus Izabela kiu edziniĝintus, ŝi mem estus travivinta la vivon de sia fratino, kaj reciproke.

Ambaŭ ili vaste esploras; kaj laŭ iuj aspektoj, la vivo al ŝi prokurata amplekse sufiĉas.

Fino de la unua parto  
(daŭrigota en la venonta numero)...

Tradukis Jean *DIETRICH*

## Raporto verkita de *Jean MARIN*

# 9-a Eŭropa Esperanto-kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio

Ĝi okazis en la urbo *Galway*, en Irlando, de la 16a ĝis la 20-a de Julio. Antaŭkongreso.

Ĝi daŭris de la 14a ĝis la 16a de Julio kaj ebligis malkovri Irlandon.

### IRLANDO

44 000 km<sup>2</sup> (Francio 550 000 km<sup>2</sup>).  
3 800 000 loĝantoj (Francio 60 milionoj da loĝantoj)

### Denseco

60 Loĝantoj/km<sup>2</sup> (Francio 112 Loĝantoj/km<sup>2</sup>).

### Ekstremaj densecoj

Monako: 235 Loĝantoj/km<sup>2</sup>  
Mongolio: 1,8 Loĝantoj/km<sup>2</sup>  
La Irlanda loĝantaro reprezentas 1 % de la Eŭropa loĝantaro.

### Religio:

93% de la Irlandanoj estas katolikoj.  
Irlandaj stratoj: 87 000 km.

Aŭtovojoj: 66 km  
Fervojoj: 1 947 km.  
Navigeblaj vojoj: 5 000 km  
Marbordo: 3 172 km  
Kulmino: 1 041 metroj sur *Cairotuohill*.

La lingvo estas grava problemo en Irlando. Kelta lingvo, ĝi apartenas al la sama familio kiel la bretona, la manksa, la kornika, la skot-gaela.

La graveco de la Irlanda lingvo terure falis inter 1851 (1 500 000 parolantoj) kaj 1911 (400 000 parolantoj). (Tio pro la granda malsatego de 1845–1847, kiu mortigis unu milionon da Irlandanoj, kaj la granda elmigrado kiu sekvis.) La detruo de la rikolto de terpomoj, ekstermitaj de milduo, kaŭzis tiun malsategon. En 2012: 1200 parolas ĝin ĉiutage. Nur en kelkaj komunumoj ĉefe en okcidenta Irlando (*Gaeltacht*) la Irlanda lingvo estas ĉiutage uzata: 20 000 enloĝantoj inter kiuj 17 000 parolas la Irlandan en *Gaeltacht*. Malgraŭ la oficialaj rimedoj por renaskigi kaj pludaŭrigi la Irlandan lingvon, la Irlandanoj mem forte dubas ke ĝi, iam, fariĝos la lingvo de Irlando. Surstrate la nomoj de la urboj kaj vilaĝoj estas en la du lingvoj, kaj ankaŭ kelkaj raraj indikoj (ekzemple sur la vojo rezervita al la busoj oni povas vidi: "BUS" kaj "LANA"). Sed tiuj indikoj en la Irlanda estas raregaj.

Por komparo kun la franca, oni povas noti ke nur unu cento da vortoj de la gaela lingvo de la Gaŭloj pluvivas en la franca lingvo, kaj 500 000 homoj, (ĉefe maljunaj kamparanoj), ankoraŭ parolas la bretonan, laŭdire, plus 20 000, ĉefe intelektuloj, kiuj ĝin lernis.

### Agrikulturo, industrio.

Peza industrio (ekz. ŝtalo) preskaŭ ne ekzistas en Irlando, sed:

- 1 – estas fabrikado de viskio kaj biero (*Guinness* ekzemple), konservo de viando, laktaĵo, fiŝaĵo, teksaĵo (lino importita: 100 000 laboristoj).
  - 2 – 8% de la eksportaĵoj estas agrikulturaĵoj altkvalitaj kaj maraj produktoj kaj konstante kreskas
- Plie:
- 1 – 13 el la 15 pli grandaj farmaciaj grupoj estas en Irlando.
  - 2 – 40 % de la laborpostenoj estas en superaj teknologioj (25 % en Francio).
  - 3 – Irlando estas la dua eksportisto de programaro (softvaro) en la mondo.
  - 4 – 6 milionoj da turistoj vizitas ĉiujare Irlandon.

5 – 10 % da kreskado ĉiujare.

Kio okulfrapas, kiam oni veturas tra Irlando, estas la vastegaj surfacoj dediĉitaj al herbejoj, ofte sen brutaro, kiu disponas ĉiam pri vasta spaco. Mi neniam vidis intensivan bredadon de brutaro, sed, eble, tamen, ĝi ekzistas. Kelkaj ciferoj:

Agrikulturo: ĝi okupas 70 % de la loĝantaro. Herbejoj: 46 % de la lando.

Bovoj: 5 600 000 (pli ol la loĝantoj!)  
Ŝafoj, porkoj, ĉevaloj, poneoj, kortobirdoj kompletigas la tabelon.

La kultivita surfaco reprezentas nur 19 % de la grundo: terpomo, hordeo (por la biero), sukerbeto, aveno kaj tritiko.

Du flughavenoj: *Dublin* kaj *Shannon*. Turismo gravas: preskaŭ 2 milionoj da turistoj.

(Tiuj ciferoj koncernas Irlandan Respublikon)

### LA ANTAŬKONGRESO

Ĝi ebligis malkovri tipe Irlandajn pejzaĝojn: vastaj ebenaĵoj, nudaj rokaj montetoj, heĝaj kamparoj, kilometroj da ŝtonaj muroj: 12 000 km (kaj 850 enloĝantoj) sur la malgranda insulo *Aran* (42 km<sup>2</sup>)! Ni trairis Irlandon, de *Dublin*, orienta marbordo (Irlanda Maro) ĝis *Galway*, apud Atlantiko.

Tie ni malkovris ne nur pejzaĝojn, altajn klifojn, sed ankaŭ historiajn monumentojn kaj ruinojn de abatejoj kaj preĝejoj, malnovegajn ŝtonajn krucojn, dolmenojn kaj fortikaĵojn datumantajn de miloj da jaroj, sub la kompetenta kaj afabla ĉiceronado de Irlandaj samideanoj.

### LA KONGRESO

150 personoj el 31 landoj partoprenis.

Ĝi daŭris 5 tagojn kaj proponis pli ol 20 interesegejn prelegojn ĉirkaŭ la temo "**Lingvo-lernado en EU**": lerni pli, kosti malpli. Rapida kurso pri la Irlanda lingvo, Irlanda vespero kun muziko, distraĵoj kaj artaj vesperoj kun artistoj talentoplenaj kiel jOmO (Francio), *Saša PILIPOVIĆ* (Serbio) kaj *Georgo HANDZLIK* (Pollando).

La prezidanto de Irlando kaj la

ŝtatministrino pri Eŭropaj aferoj salutis la kongreson okaze de la malfermo.

La 20an de Julio finiĝis la kongreso, plena semajno de instruo kaj plezuro.

### LA POSTKONGRESO

Ĝi kondukis nin al la insuloj *Aran*, kelkajn km for de la Irlanda marbordo. La ŝipirado daŭris 45 minutojn kaj ni atingis la pli grandan insulon, *InisMor* (14 km x 3 km), kaj certe la plej interesan: 50 monumentoj, ĉefe prahistoriaj dolmenoj, kaj multnombraj ŝtonaj fortikaĵoj.

Miloj da marbirdoj nestas sur la altegaj klifoj (de 90 ĝis 120 metrojn altaj). La tero estas aŭ pli ĝuste estis nur roka, sen ia kreskaĵo. La enloĝantoj kreis la grundon, alportante sablon kaj algojn. Ili ĉirkaŭigis etegajn kampojn per muroj sen mortero: 12 000 km da muroj, apenaŭ kredebla, giganta laboro!

Tiuj kampoj estas ĉefe herbejoj. Mi vidis nur unu kampon de terpomoj (apenaŭ 10 m x 10 m!). Dum nia trauro de Irlando, de *Dublin* al *Galway* (pli ol 200 km), la spektaklo estis la sama: herbejoj (ĉirkaŭitaj de heĝoj aŭ ŝtonaj muroj). Nur apenaŭ la duono de ili entenis brutaron: ĉefe bovinoj el multnombraj raso, ĉevaloj, poneoj, iom pli raraj ŝafoj (ofte kun nigraj kapoj, kiel en Skotlando) kaj porkoj. Mi vidis neniujn kortobirdojn, kokinojn aŭ anasojn.

Konklude, interesplena kongreso, kun kelkaj folkloraj vesperoj en tiuj bruegaj "*pub*" kies sekreto Irlando kaj Skotlando posedas.

Kaj nun, niajn plej sincerajn dankojn al ĉiuj membroj de la kongresa organiza komitato, ĉiuj tiom afablaj, helpemaj kaj efikaj, kiuj sciis modele organizi tiun 9an Eŭropan kongreson.

Jean MARIN

## Traduko pri naturo

## La plej belaj okazaĵoj pri birdoj (dua parto)

Teksto verkita de *Elían J. FINBERT*  
Esperanta traduko de *Roland PLATTEAU*  
(Sekvo de la Januara artikolo pri la sama temo)



**PASERO – Rakonto n° 105 p. 162-166**

La pasero estas supozeble la plej konata el la birdoj. Tiu besteto estas "societema"; ĝia vivado disvolviĝas ĉe niaj okuloj, kaj tamen ĝi restas de ni nekonata. Fakte, kvankam ĝi ĉiam sekvas la homojn ĉu en urboj ĉu en vilaĝoj, ĝi ne konsentas sin senvaligi.

Estis dirate pri ĝi, ke ĝi estas glutema, spitema, blekema, malĉasta, rabema, babilema, aŭdaca, malcedema, senĝena kaj ofendema, krome igata de senĉesa bezono ĉiujn alspiti kaj eĉ mistifiki. Tiaj estas ja la karakterizoj atribuitaj al ĝi, laŭ simileco al ni homoj; kaj ni ne vidas ĝian ĉefan econ, taksante tia tiun birdon.

En la realo, por ĝin bone kompreni, necesas antaŭ ĉio scii ĝian korpan funkciadon. Tio klarigas ĝian viglecon, ĝian rapidecon, kaj tion, kio povas esti komprenata kiel ĝia petolemo. Tiel estas dirate, ke ĝi estas glutema kaj tromanĝema. Sed tiu voremo, kiu igas ĝin veni ekŝteli ĝis ĉe niaj piedoj panerojn kun familiareco, kaj kiu en la publikaj parkoj igas ĝin sin lasi delogi de tiuj, kiuj kutimas provizi ĝin per manĝo, kompreniĝas pere de la proprajoj de ĝia spiraparato. Ĝi ja spiras po cent fojoj ĉiuminute, dum kokino spiras po nur dekdu fojoj. Tiu spirrapideco respondas ĉe ĝi al korpa brulado. La pasero interne "brulas" kiel mal-

granda ardaĵo, kaj pro tio konsumas multajn vivmaterialojn. Ĝi laŭlitere voras sin kaj, por pluesti, ĝi estas devigata senĉese nutri sian internan biologian fornon. Tial tiu spira kaj samtempe kora rapidego, faras ĝin tre sendefenda kontraŭ toksaĵoj. Ĝi bezonas vivi en aero ne malpura, kaj se ĝi kapablas pluvivi en niaj urbegoj, tio estas nur, ĉar ĝi trovas tie pli facile sian manĝon, kaj ĉar ĝi kapablis adaptiĝi. La ministoj uzas ĝin por malkovri eventualan karbonan monoksidon, sobirante en la fundon de siaj galerioj kun ĝi enkaĝigita kiel alarmsensilo. Ĝi ofte pereas pro tiu ofero, trudita al ĝi.

Mi iam bredis paseron, kiu estis tre longtempe mia ĉiutaga kunulo. Mi trovis ĝin en la Pariza "*Jardin du Luxembourg*"; ĝi estis falinta el sia nesto, kaj mi ĝin levis kaj kunportis. Ĝi lasis sin malsovaĝigi tre facile, kaj ĝi estis tuj reaganta kiam mi ĝin vokis per ĝia nomo. Mi kunportis ĝin ĉien, en mia poŝo, kie ĝi ne moviĝis; kelkfoje, kiam ĝi estis laciĝinta, ĝi eligis du-tri mallongajn vokojn. Iam, kiam mi estis veturanta en la metroo, kaj ne povis ĝin liberigi, ĝi ribelis, ĝi ŝprucis el la poŝo de mia palto, kaj ekflugetadis, kaŭzante grandan ĝojon al la kunvojaĝantoj. Ĝi revenis post kelkaj momentoj sur mian ŝultron, kaj poste ĝi reeniris sian ĉelon.

(Tiu poŝo estis ĝia plej ŝatata "hejmo". Iam, por ĝin inciteti, mi estis fermkudrinta ties enirtruon, per trikvar kudreroj; ĝi malkudris ilin furioze, unu post la alia, per la pinto de sia beko, kun rimarkinda lerteco.) Strikte obeema, ĝi kolektadis jen plumon jen pinglon, kaj alportis ĝin al mi. Libere flugante ien kaj aliloken libere, ĝi sidadis sur la breto de la kameno, kaj ekvokadis min per sia pepado, kiun ĝi direktis al mi. Se mi prenis libron, ĝi tuj ekmutiĝis, kaj promenadis seriozmiene tra la ĉambro. Iam la knarado de mia skribplumo ĝuigis ĝin; tiam, ĝi alflugis sur mian tablon, klinis la kapon maldekstren, dekstren, sekvis la

skribomovon, saltetante sekve al mia mano, kaj finfine pinĉis la fontoplumon per la beko, flankentirante por malhelpi min plu skribi.

Ĝi estis multimema kaj decidema. Ĝi vivadis laŭ bonaj rilatoj kun la hundo kaj la kato de la domo; ĝi ofte sidis sur iliajn dorsojn, ĝi ilin beketis, kaj direktis al ili fortajn bekfrapojn por ilin kvietigi.

La kato ofte uzis ĝin kiel ludilon, kaj ĝi faris same kun la kato. Mi ofte trovis la paseron, kun la kapo sub la flugilo, dormantan inter la kruroj de sia amiko, kiu ronronadis pro feliĉo. Kiam ili ne vidis unu la alian, ili sin serĉadis reciproke tra la domo, kaj vokadis unu la alian per siaj blekoj, tiagrade ke iam, kiam la pasero estis kaŝiĝinta en nealirebla loko, nur la miaŭoj de la kato kapablis ĝin revenigi.



lun jaron ĝi daŭre restis netrovebla. Ĉar ĝi estis flugetinta al la najbaraj tegmentoj, mi kredis, ke ĝi estas min forgesinta, kaj ke ĝi neniam revenos. Ĝi fakte revenis post kvar monatoj, kun kvar el siaj idoj, kiujn ĝi prezentis kiel ateston de fideleco. Ĝia birdino, maltrankvila, atendis ĝin sur la defluilo de la tegmento, pepante. Ĝi reflugis al ŝi kun sia idaro, kaj ĝi foriris. Danke al ĝi mi lernis la lingvon de la paseroj, kiun oni povas interpreti laŭ la diversaj tonoj de ilia voĉo. Ili havas apartan blekon por admoni siajn birdinon kaj idojn resti mutaj dum proksimiĝas rabobirdo ili havas aliajn blekojn, por ekflugi, por peti nutron, por diri sian ĝojon aŭ sian doloron, por inviti samspecianojn veni kaj manĝi kun ili iun glutindaĵon, kiun ili trovis. Mia pasero nuancis sian

parolon, se eblas tiel diri, kiam ĝi direktiĝis al mi; eble pro tio, ke mi ne estis pasero; ĉar poste, direktante mian oreilon al la "parolo" de aliaj ĝiaj samgentanoj, al kiuj mi kutimiĝis, mi konstatis, ke mi bone aŭdas tion, kion ili diras al mi, sed ke iliaj arioj estas malpli modulataj kaj pli akraj ol tiuj de mia pasero. Certe estis en la tonoj de mia pasero tiu tenereco, kiun ni metas en niaj propraj tonoj, kiam ni amas iun.

#### TURTO –Rakonto n° 238 p. 333

Dum mi pretas elvoki la memoron pri mia turto, mia tuta infanaĝo reekaperas denove. Tiu turto estis la unua besta estaĵo, al kiu mi direktis korespondon.

Ĝin estis donacinta al mi iu kolego, por ke li sin liberigu de ĝi, ĉar li

konvinkiĝis, ke ĝi mortos. Efektive, apenaŭ plumkovrita, ĝi aspektis tre malbonfarta. Sed mi tiom zorge flegis ĝin, ke ĝi resaniĝis, kaj tiom korigiĝis al mi, ke mi ja ne plu povis eskapi el ĝiaj elontroj de fideleco, per kiuj ĝi min superŝutis.

Ĝi sekvis min ĉien. Konstante en libero, ĝi flugadis de ĉambro al ĉambro; kaj, se de la fenestro okazis ke ĝi ekvidas min sur strato, ĝi alvenis sin meti sur mian ŝultron. Kaj ekestis riverencoj, kaj amikaj kveroj, kaj bekfrapetoj senfinaj; ĝi ŝveligis la gorĝon, vigleta kaj plene feliĉa.

La jaroj tiel pasis, kaj ĝia inklino daŭre pliiĝis dum la tempopaso. Ĉiu el miaj neĉeestoj estis por ĝi la kaŭzo de senlima aflikto. Ekde kiam mi foriris, ĝi ekkomprenis tre certe, ke mi estas malproksime, tro malproksime por ke

ĝi povu retrovi min. Ĝi tial kaŝtiris sin en malhelan angulon de la apartamento. Kaj, mallevante la kapon, skuante la flugilojn laŭ hakita tremetado, ĝi elaŭdigis dum la tuta tago tiun specifan kveradon, malrapidan kaj melankolian, tiom rimarkindan ĉe la turtoj. Kaj tiam estis ege malfacile igi ĝin konsenti gluti iom da nutro.

Sed kiam mi revenis, estis superfluanta ĝojo, senfina, komparebla nur al tiu, kiun hundoj, ĉefe la spanioloj, elmontras al sia mastro, lin revidante post longa foresto.

Neniam tiom, kiom en tiu turto, mi renkontis tielan emocian intenson en korligo kaj fido.

Tradukis Roland PLATTEAU

## Koncize

# Mallongaĵoj

### Alloga Babelo !

Post granda ekspozicio en Lille, la temo "Babelo" estas ŝatata de multaj verkistoj kaj revuoj. Jen kelkaj ekzemploj:

"*Debout dans BABEL. Les langues en Europe*" – 144-paĝa libro, 16 lingvoj. 16 verkistoj el Eŭropo parolas al ni pri siaj lingvoj, kiuj estas – aŭ ne – iliaj verklingvoj, kaj ili diras la malbonon kaj la bonon, kiujn ili opinias pri la multlingvismo.

Multlingvismo (Eldono: *Ons Erfdeel*).

"*Le CAUCASE, une montagne de langues*" (*Réveillez-vous*, 12/2012).

Simila temo en "*Langues sans frontières*".

**Prelegoj kaj dika libro** de G. KER-SAUDY (40 lingvoj, ankaŭ Esperanto). "*À la découverte des langues de l'Europe*".

**Papa mesaĝo.** 25/12/2012 (France 2 – televido): Esperanto kaj 64 aliaj lingvoj. Granda panelo "ESPERANTO" sur la placo Sankta Petro.

"*A book about language*", de N.

**GILOTEAUX. Anglalingva kun 4 paĝoj pri Esperanto**, kaj kun biografieto de la aŭtorino.

**En Radio RTL.** 23/12/2012. Speciala kroniko pri "*Langues étrangères*".

Pri la lingvo de ZAMENHOF, unu vorto: "Esperanto".

### ĈU LA PLEJ FORTA ?

Dupaĝa artikolo de P. DUBOURG GLATIGNY (LOE 1/2013): "*RUTINO? la plej forta malamiko de Esperanto.*"

Ankaŭ en "La Ondo de Esperanto": La deka serio 2008-2013. Nia trezoro: 10 libroj, 10 Esperanto-gazetoj, 10 originalaj romanoj, 10 E-eldonejoj, 10 E-poetoj; kaj en 2013: Eminentuloj pri Esperanto (TOLSTOJ, Jules VERNE, J. N. BAUDOIN DE COURTENAY).

### Nova kalendaro

Iniciatis la E-klubo de Saint-Raphaël – Fréjus. "Senfina kalendaro". Fotoj kaj dulingvaj poemoj de J. SARRAMEA. Formato 17 x 24 cm.

### Ses poŝtmarkoj el Nederlando

UEA eldonigis (Poŝt - NL) 6 poŝtmark-

ojn validajn por afranki unuklasajn leterojn (20 g) en Nederlando.

Diversaj temoj: La Unua Libro, UK en Roterdamo, Fondo de UEA, ZAMENHOF, LAPENNA...

Filatelaj revuoj favore raportis.

### Lingva kontribuo

Per interreto, deko da esperantistoj lerte reagis al pozitiva letero de Ingrid PILLER, profesoro pri lingvistiko en Sydney, Macquarie University.

De la Esperanto-urbo Herzberg, artikolo en "*Der Spiegel*", lernejoj interŝanĝoj, ktp.

"*The Power of Esperanto*".

### Sukcesa temo

En Lille, dum ok monatoj de la 8/6/12 ĝis la 14/1/13, granda ekspozicio pri Babel allogas prezentis plej diversajn modernajn verkojn de nuntempaj artistoj: "La libro-turo" (15 000 volumoj); "La turo de Bruselo"; ktp. Estas notindaj: la ekspozicia gvidlibro kaj la kronologiaj paneloj (kun anglaj kaj francaj tekstoj).

Estas notinde:

En 1887: "Kreado de Esperanto, kies

unu el la unuaj simboloj estas Babel-Turo.”

“La utopio pri reveno al unusola lingvo – kiel hipotezo de universala lingvo – naskis plurajn provojn”.

### Prodiĝa povo

Nova Libro de *Olivier d'ARGENLIEU*: “*Le prodigieux pouvoir des citoyens du Monde*”

Havebla en Esperanto, laŭ traduko de *André ALBAULT*: “La prodiĝa povo de la Mondcivitanoj”.

### Du opinioj

Laŭ *Michel SERRES* (en “*Pèlerin*”, 29/11/2012) kaj *Umberto ECO* (en “*Philosophie Magazine*”, Decembro 2012–Januaro 2013).

“...La lingvo estas malfacilaĵo, sed ne nesuperregebla obstaklo... Kiam Eŭropo estis fondata, ni stulte komencis laŭ ekonomio, karbo kaj ŝtalo. Dudek jarojn pli poste, ne plu estis karbo. Se ni estus komencintaj laŭ la lingvoj, ĉiu nun parolus kvar lingvojn, kiel iu ajn svizo!...”

*Michel SERRES*

“... Eŭropon minacas la plureco de la lingvoj; ĝi devas superregi tiun difekton... La angla lingvo parolata de la Eŭropanoj ne utilas al ili por pli bone interkompreniĝi...”

Eŭropo havas eblecon estiĝi plurlingva, perlingve kaj ankaŭ permense. Permense plurlingvismo konsistas el provado kompreni la rezonmodon de la aliaj kulturoj...”

*Umberto ECO*

### “Questions pour un champion”

En tiu televida ludo. Post trafaj klarigoj de la ludestro, iu kandidatino (*Isabelle*) ĝuste respondis al demando pri la lingvo ESPERANTO.

### Televidaj notoj

(Eltiritajoj de “*Interdits d'Enfants*”, franctelevida filmo, 9/01/2013, du-lingva dialogo).

“Vi diris ‘mia’, sed vi pensas ‘via’, kvazaŭ mi estus tute preferinda pri tiu afero.

— Excuse-moi, je ne le ferai plus.

— Vi eĉ ne konscias pri tio kion vi faras.

— En quelle langue tu me parles ?

— En espéranto, la langue de l'espoir. L'espoir que les gens se comprennent et se respectent, un rêve d'ado...”

### Granda librejo

Dum intervjuo, la verkisto *René de OBALDIA* plurfoje menciis Esperanton kaj diverslingvajn tradukojn.

(«*La Grande Librairie*», F5, 17/01/2013).

### “Paspartuo” n° 43

#### “ĈU EŬRO NASKIĜIS EN LEFFE?”

Foto kaj artikolo pri la nomigo de la Eŭropa monunuo, laŭ iniciato de la belga aktivulo *Germain PIRLOT*.

(Laŭ “*Passe-partout*”, N° 43, Oktobro 2012).

### Kroma temo

En Hungario, por ricevi universitatan diplomon, studento devas sukcesi en ekzameno pri iu fremda lingvo (ekzemple: Esperanto) kun “faka kaj scienca literaturo”.

### Nova stacidomo

La jarkolekto de “*TAKE*” (2006/2012) konsistas el fakaj kaj aktualaj artikoloj pri diversaj temoj. Ekzemple:

“*La renovigo de la stacidomo de Stuttgart (Germanio), teknikaj kaj sociaj problemoj*”.

### “INDIGNU!”

Omaĝe al *Stéphane HESSEL* (1917-2013). Intervjuoj, recenzoj, kronikoj; eldonoj kaj reeldonoj en multaj lingvoj. Ankaŭ traduko en Esperanton. (“*Indignez-vous!*” – eldonejo *Indigène*).

### Arras, Paris, Sydney

Post plurjara paŭzo, Esperanto-budo denove funkciis dum la lingva ekspozicio “*Expolangues*” en Parizo en 2013.

La prezidanto de *Arras-Espéranto* sukcese partoprenis en la populara demand-ludo “*Le jeu des 1000 Euros*” (*Radio France-Inter* – *Jacky RAMON*; 15/02/2013).

En 3-paĝa artikolo, *David ASTLE* trafte pritraktas Esperanton. Krome la aŭtoro kompilas novan libron pri Esperanto kaj krucvortoj (“*Smith Journal*” N° 5).

### La Ruĝa Libreto

lom da historio: antaŭ la unua mondmilito, la franca firmao *Hachette* surmerkatis 350 librojn en kaj pri Esperanto, plejparte lernolibrojn.

Ekzemple: “*Premier manuel d'Espéranto*”, “*Kolekto de la Revuo*” havis centmilojn da ekzempleroj. Pro la kovrilo (ruĝkolora), ĝia populara nomo estis “*Le petit livre rouge*” (La ruĝa libreto). Ne konfuzu kun ĉina eldonaĵo (*Mao*).

### El la gazetaro

“*Quelle langue en 3000? Un anglais succinct que l'on utilise dans les taxis et dans les textos*”. (*B. CYRULNIK / Match*).

Lingva prizono. “*Beaucoup de gens parlent la même langue, mais ils ne se comprennent pas. Pourquoi existe-t-il plusieurs langues et non pas une seule? Peut-on parler de 'Prison linguistique'?*” (*Nord-Eclair*, 15/01/2013).

### Ne kaj jes (la ministro kaj la homo).

Iam franca ministro skribe esprimis negativan sintenon pri Esperanto. Kelkajn jarojn poste, la eks-ministro, denove parlamentano, respondis al letero de esperantisto. Li profitis la okazon, por klarigi sian unuan reagon: “Mia unua (malfavora) respondo estiĝis pere de ministraj sintenoj, kun financaj kaj politikaj flankoj”. Sed tiam, li trovis “Nenian malutilon en la sukcesa disvolviĝo de Esperanto”. (El privata korespondaĵo, jaro 1979).

Kompilis kaj komentis  
*Lucien GILOTEAUX*

## Atentigo de la redaktoro

**Por pliintimigi la rilatojn inter la Norda Gazeto kaj ĝiaj legantoj**  
Mi ŝatus ricevi, pri la enhavo kaj la prezento de nia gazeto, rimarkojn, komentojn, kritikojn. Ankaŭ originalajn aŭ tradukitajn artikolojn pri lokaj aŭ nelokaj temoj. Kaj eĉ eventualajn insultojn aŭ gratulojn!!...

### Niaj federaciaj aliĝoj al UFE, se tio ne estas jam farita

Mi jam havis la okazon, kiam mi prezidis UFE, skribi al niaj federaciaj ne-UFE-anoj, por ke ili aliĝu al UFE. Kaj same mi skribis al la UFE-anoj de nia regiono ne-Nord-federaciaj, por ke ili aliĝu al nia federacio. La pligrandigo de la nombro de aktivuloj en niaj movadaj asocioj ja pligravigus nian pezon al ĉiuj lokaj kaj naciaj instancoj. Mi refaras mian alvokon. Krome la

eventuala (de mi dezirata) alprenofare de nia federacio de "Interasocia Kotizo" al UFE, priskribita en la ĉinumerata frontartikolo draste malpliigus ĉies kotizon. Nur avantaĝojn!...

### Ĉu vi ankoraŭ ne posedas la diplomojn de FEI kaj de KER?

Tiam profitu la eblecon trapasi tiujn ekzamenojn – de la Eŭropa KER dum la naciaj kongresoj de UFE, kaj de la nacia FEI en Lille ĉiujare fine de Junio. Ambaŭ diplomoj estas nepre utilaj, aparte por konvinki niajn Franciajn instancojn de la Nacia Instruado.

### Profitu la ofertojn de la Kulturdomo de Grésillon por travivi allogajn staĝojn en simpatia etoso!!

Kontakto: MCE Grésillon

49150 Saint-Martin d'Arcé  
02 41 89 10 34

### Laŭtema somera programo

- Turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj (6-13 de Julio);
- Art-amatora semajno (13-20 de Julio);
- Alternativa MOJOSejo (20-27 de Julio);
- Festa semajno por infanoj kaj familioj (3-10 de Aŭgusto);
- Teatra aktora semajno (10-17 de Aŭgusto).

### Staĝo aŭtuna, la ferioj

26 de Septembro – 02 de Oktobro  
feriado por infanoj, familioj, kaj vi.  
Kursoj, aktivaj kaj programo por infanoj.

Claude LONGUE-ÉPÉE

## Asociaj kaj redakciaj informoj

### FÉDÉRATION ESPÉRANTO NORD Prezidanto (eldona direktoro de la gazeto):

Michel DECHY  
65 Allée Crémaillère  
59650 VILLENEUVE-D'ASCQ  
Tel: 06 16 98 41 02  
mdechy@esperanto-nord.org

### Sekretario:

Katja BOEN  
51 Avenue du Maréchal Leclerc  
59130 LAMBERSART  
Tel: 03 20 92 31 36  
cboen@esperanto-nord.org

### Kasisto:

Xavier VILAIN  
Résidence L'Alcyon – Apt. 41  
90 rue du Maréchal Joffre  
59240 DUNKERQUE  
Tel. 06 70 65 93 29  
xvilain@esperanto-nord.org

### Tarifo de kotizoj:

13 € por plenkreskulo, 8 € por junulo, studento, senlaborulo.  
Per ĉeko al la ordono de "Fédération Espéranto-Nord" sendota al la kasisto.

### BULTENO "NORDA GAZETO" Ĉefredaktoro:

Claude LONGUE-ÉPÉE  
320 rue des 4 Bons Dieux  
59235 BERSÉE  
Tel. 03 20 59 28 80  
plongueepe@free.fr

### Federacia retejo:

<http://www.esperanto-nord.org>

### Konstantaj korespondantoj:

- ★ Amiens  
Cyrille DÉCOUTURE  
kontakto@esperanto80.org
- ★ Arras  
Jean HENNEBERT  
jhennebert@esperanto-nord.org
- ★ Boulogne  
Marie-Jeanne LINÉ  
mjline@esperanto-nord.org
- ★ Dunkerque  
Elise DEPLA  
edepla@yahoo.fr
- ★ Lille-Villeneuve  
Katja BOEN  
cboen@esperanto-nord.org
- ★ Valenciennes  
Jean-Marc FRATARD  
jmfratard@esperanto-nord.org

### Enpaĝigado:

Cyrille DÉCOUTURE  
10 chemin des Oiseaux  
76270 FESQUES  
kontakto@esperanto80.org  
Tel: 06 78 80 78 45

### Kontrolantoj-korektantoj:

Claude Longue-Épée  
plongueepe@free.fr  
Pascal VILAIN  
p.vilain83@orange.fr

### Presado, enkovertigo, sendado:

Richard VALET  
Rue du Boulenniez 59235 BERSÉE  
rf.valet@wanadoo.fr

La tekstoj de artikoloj estu sendotaj antaŭ la 25-a de Aŭgusto 2013.

### Partoprenis je tiu ĉi numero

Arlette PLUTNIAK, Jean HENNEBERT, Claude LONGUE-ÉPÉE, Daniel DEVIS, Cyrille DÉCOUTURE, Renée TORDEUX, Xavier VILAIN, Théodore MACAIGNE, Michel DECHY kaj Katja BOEN, Caroline HUYARD kaj Laurent ZIBELL, Jean DIETRICH, Bernadette MANIER kaj Thérèse-Marie FRENOY, Jean MARIN, Roland PLATTEAU, Lucien GILOTEAUX.





# NORDA GAZETO

## SUPLEMENTO POR KOMENCANTOJ


Sendita kun la bulteno de Esperanto-Nord n-ro 1/425

junio 2013


### K A L I N

Post la dua mondmilito, proksime al mia domo, staris bela farmobieno<sup>1</sup>. Tie, la farmisto bredis<sup>2</sup> grandan brutaron<sup>3</sup> kaj kultivis vastajn kampojn.

Ĉiutage, mi iris tien aĉeti freŝan lakton por mia patrino. Ofte, mi aĉetis ankaŭ buteron faritan de la farmistino el la lakto kaj deliciajn dikajn ovojn, ĵus ellasitajn<sup>4</sup>. En la stalo<sup>5</sup>, mi admiris la kvietemajn<sup>6</sup> bovinojn pacience remaĉantajn<sup>7</sup>, dum la farmistino melkis<sup>8</sup> ilin.



En la ĉevalejo staris la giganta plugĉevalino<sup>9</sup> Kalin, kun ruĝa robo, nigraj krinaro<sup>10</sup> kaj vosto, larĝaj hufoj<sup>11</sup>.



Mi donacis al ŝi sukerpecon kiun ŝi delikate prenis el mia malfermita mano per siaj lipoj tiel mildaj kiel veluro. Ŝia pezo altis 800 kilogramojn.

Tiu fortegulino<sup>12</sup> kapablis treni ĉarojn portantajn pezegajn ŝarĝojn: fojn<sup>13</sup>, tritikon<sup>14</sup>, betojn, sterkon<sup>15</sup>, teron. Ŝi trenis ankaŭ pezan plugilon<sup>16</sup> por bone fosi sulkojn<sup>17</sup> en la tero. Ŝi estis obeema, kuraĝa kaj milda.

Dum 25 jaroj, ŝi senĉese laboris kaj naskis<sup>18</sup> ĉevalidon ĉiun duan jaron<sup>19</sup>. Ŝi komprenis ĉion.

Bedaŭrinde, pro modernigado<sup>20</sup>, la farmisto aĉetis belan ruĝan traktoron. Kalin iĝis senutila.

lam, frumatene, venis la buĉisto<sup>21</sup>. Tute fide<sup>22</sup>, la ĉevalino grimpis obeeme en lian brutveturilon<sup>23</sup>. Post 25 jaroj da laboro, rekompence<sup>24</sup>, ŝi finiĝis kiel 800 kilograma viandpeco.

**Richard VALET**

### Vortprovizo

- 1 farmobieno = ferme
- 2 bredi = élever des animaux
- 3 brutaro = troupeau de bovins
- 4 ovo ĵus ellasita = œuf fraîchement pondu
- 5 stalo = étable
- 6 kvietema = placide
- 7 remaĉi = ruminer
- 8 melki = traire
- 9 plugĉevalo = cheval de labour
- 10 krinaro = crinière
- 11 hufo = sabot (cheval)
- 12 fortegulino = colosse femelle

- 13 fojno = foin
- 14 tritiko = blé
- 15 sterko = fumier
- 16 plugilo = charrue
- 17 sulko = sillon
- 18 naski = donner naissance à
- 19 ĉiun duan jaron = tous les 2 ans
- 20 modernigado = modernisation
- 21 buĉisto = équarisseur
- 22 tute fide = en toute confiance
- 23 brutveturilo = bétailière
- 24 rekompence = en récompense



# Ni ludu

## Ĉe la policejo

Vizitanto: Mi volas deponi plendon.  
 Agento: Pri kio temas?  
 Vizitanto: De kelkaj tempoj, mi plurfoje ricevis minacleterojn.  
 Agento: Ĉu vi havas ideon pri kiu ilin skribis?  
 Vizitanto: Jes, tiu persono estas la . . . . . , kompreneble!

Por trovi tiun personon kiu sendis minacleterojn, forigu la literojn de ĉiu proponita vorto, laŭ la ĉi-subaj difinoj, kaj uzu la ceteran literon.

- 1 – Legomo ŝatata de la kuniklo.
- 2 – Medikamento en formo de buleto.
- 3 – Vitra vazo kun mallarĝa kolo uzita por enteni trinkaĵon.
- 4 – Ĉefurbo de Rusio.
- 5 – Ŝaŭmiga likvaĵo aŭ polvo uzata por lavi la harojn.
- 6 – Tropika birdo kapabla imiti la homan voĉon.
- 7 – Unu el la ekstremaj moveblaj partoj de mano.
- 8 – Laŭleĝa ligo de viro kun virino.
- 9 – Bruselo estas ĝia ĉefurbo.
- 10 – Antaŭa parto de la homa korpo de la kolo ĝis la ventro.



1	O	K	I	T	A	R	O
2	O	L	I	M	P	L	O
3	P	E	L	T	O	B	O
4	S	O	K	V	O	M	O
5	M	U	Ŝ	A	S	P	O
6	P	A	G	T	A	P	O
7	G	R	I	N	I	F	O
8	Ĝ	I	S	D	E	Z	O
9	G	I	T	E	B	L	O
10	S	U	R	T	O	B	O

## Silabkrucvortenigmo

En ĉiu ĉelo de tiu krucvortenigmo troviĝas unu dulitera silabo.

	1	2	3	4	5	6	7
1							
2							
3	TO						
4							
5							
6							
7							

Horizontale

- 1 - Gastropodo vivanta sur vegetaĵoj.  
- Senti entuziasman raven rigardante ion aparte belan.
- 2 - Manĝaĵo farita el knedita, fermentinta kaj bakita faruno.  
- Unu el la kurbaj ostoj kiuj ŝirmas la brustan kavon ĉe vertebruloj.
- 3 - Manĝilo konsistanta el tenilo kaj kava parto per kiu oni ĉerpas likvaĵojn.
- 4 - Movebla karnorando de la buŝaperturo kiu kovras la dentojn.  
- Vasta etendaĵo de sala akvo.
- 5 - Regiono situata en la oriento de Francio.
- 6 - Amfibio simila al bufo sed senveruka haŭto.  
- Tero aŭ polvo miksitaj kun akvo sur strato.
- 7 - Ruĝa pomgranda frukto uzata en kuirado kruda, farĉita, oleumita...

Vertikale

- 1 - Grava organo de la vertebruloj kiu, interalie, sekrecias la galon.  
- Mara rabisto.
- 2 - Planto utiligata por fabriki teksaĵojn el la tigo kaj oleon el la semoj.  
- Rilata al vorto uzata por distingi objektojn aŭ estaĵojn.
- 3 - Duonfera konstruo sur supra parto de monumento.
- 4 - Eventuale.  
- Dumviva regnestro malpli altranga ol imperiestro.
- 5 - Literatura proza verko el longa rakonto pri image elpensitaj faktoj.
- 6 - Senti impreson de surprizo pro io stranga, neatendita, eksterordinara.  
- Parto de la korpo de homoj aŭ bestoj kuniganta la kapon kun la trunkon.
- 7 - Resti, nenion farante, por refreŝigi siajn fortojn.  
- Aparato uzata por transformi iuspecan energion en meĥanikan energion.

## Paruo serĉas sian neston

Helpu paruon por trovi sian neston formante, sur ĉiu linio, novan vorton ŝanĝante nur unu literon.

P	A	R	U	O
N	E	S	T	O



## Solvoj de la antaŭaj ludoj

**Du el kvar**  
Hieroglifo

**La kompletigota proverbo**  
Al la fiŝo ne instruu naĝarton.

**Pli - malpli**  
La diferenco inter la plej alta salto kaj la malplej alta salto estas: 60 cm.

**De kordo al lampo**

K	O	R	D	O
K	O	R	P	O
K	A	R	P	O
K	A	M	P	O
L	A	M	P	O

**Ŝarado 1:** Okcidento

**Ŝarado 2:** Arizono



Jean-Marc Fratard-Baudour

En la sama bulteno troviĝis [aliĝilo](#) al la

## Jubilea 25a Eŭropa Rendevuo en STELLA-PLAGE

Por elŝuti ĝin, sufiĉas musklaki [la jenan ligilon](#)